87/1. 16.- Ft

HUNGARIA VIVO

F/330
MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN
007802
4-56 P
LE 1990



Komuna Entrepreno de Ekstera Komerco
por Kosmetikaĵoj kaj Dommastrumaj Kemiaĵoj

1113 BUDAPEST Bocskai út 90. Hungario
Telekso: 022-4333 Telefono: 0036-1-666-622

viro kaj virin' en ĉiu aĝo
gesinjoroj, kies agojn direktas saĝo
vian domon faros pura, vian korpon sorĉos bela
vian sanon tenos bona kaj perfekta kaj modela...

CAOLA

F/330

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVIIa jaro 1987 n-ro 1
(131)

ENHAVO

Blanke, Detlev: Pri la specifaĵoj de la Esperanto-movado en kelkaj Eŭropaj socialismaj landoj 2
Milojević Simo: Kubo Havas amasan Esperanto-movadon 6
Grandaj librodonacoj ... 8
Vinokurov, J.: *** *(Márton Fejes)* 8
Dang Dinh Dam: Novaĵoj el Vjetnamio 9
Fekete, Gyula: Banas sin la fiŝoj *(Imre Szabó)* 10
Győri, László: Poemoj *(Imre Szabó)* 14
Csáth, Géza: Patrinmurdo *(István Ertl)* 15
Bálint, Szilárd: Ĉu jKaluzo estas puninda ago? 18
Vinokurov,J.:Poemoj*(Márton Fejes)* 19
Panoramo 20
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 23
Thur, O. — *Gyerkó*, Gy.: Nova rimedo en la amasa vinmanipulado 24
Modest, Julian: Ina 30
Potts, B.: Poemoj 34
Fokuso 35
Recenzoj 36
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 38
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 39
Korespondi deziras, Leterkesto 40

Sur la frontpaĝo: En la historia kvartalo de Budapeŝto (Foto de Z. Fejér)

Foto de Otto Vahl

LA JUBILEA JARO...

donas bonan okazon ankaŭ por revui la atingojn ĝisnunajn de Esperanto en la mondregiono, kie ni vivas. Tion faris tre trafe Detlev *Blanke* en „der esperantist" koncerne la Orient-Eŭropajn socialismajn landojn. El lia artikolo — kiun ni represas ĉi tie — evidentiĝas, ke la Internacia Lingvo atingis aparte gravajn rezultojn en tiu ĉi landogrupo, al kiu apartenas ankaŭ Hungario.

Alia represita artikolo — el la organo de UEA — fakte donas plian emfazon al la konstatoj de *Blanke*. Simo *Milojević*, ĝenerala direktoro de UEA, pasintjare faris viziton en Kubo, kaj en entuziasme kaj entuziasmige agordita artikolo raportas pri tio, ke *en Kubo funkcias amasa Esperanto-movado*, pri kies ekzisto la mondo ĝis nun ne konsciis. Kvazaŭ por kulmino antaŭ la redaktofino alvenis raporto el Vjetnamio, kiu heroldas pri la reaktiviĝo de la Esperanto-movado en tiu fora Azia lando. Ĉar montriĝis, ke en la menciitaj landoj la esperantistoj luktas kun prema manko de libroj, Hungara Esperanto-Asocio, dezirante elmontri sian solidarecon kaj plenumi sian internaciisman devon, decidis donaci grandan kvanton da libroj kaj revuoj al la esperantistoj en Kubo, Mongolio kaj Vjetnamio.

Sed ne nur primovadaj artikoloj plenigas tiun ĉi numeron — literaturamantoj povos legi eĉ tri novelojn. *Banas sin la fiŝoj* de la nuntempa hungara verkisto Gyula *Fekete* donas impresan kaj iom amaran bildon pri la degenero de la sentoj en la moderna homo. Per la aperigo de *Partinmurdo* de Géza *Csáth* ni omaĝas al la memoro de tragike mortinta verkisto (li mortigis sin, mortiginte sian tutan familion; cetere, li naskiĝis antaŭ cent jaroj).

La novelo *Ina* de la populara Esperanta verkisto Julian *Modest* bildigas ŝveban, nostalgian amhistorion, kiun vualas korprema mistero.

Jen, la menuo de nia unua numero en la Jubilea Jaro, kiu alportu multajn sukcesojn al la Esperanto-movado ĉie en la mondo!

Detlev Blanke

Pri specifaĵoj de la Esperanto-movado en kelkaj Eŭropaj socialismaj landoj

0. Pro spaco-limigo ne eblas trakti la temon tiom funde kiom necesus. Koncizigoj kaj resumoj havas la danĝeron de idealigoj kaj de miskomprenoj. Ne eblas sufiĉe diferencite reliefigi kontraŭdirojn, problemojn aŭ malfermajn demandojn. Krome, mi prezentas ĉi-tie mian tute personan vidpunkton.

1. La Esperanto-movado naskiĝis esence kiel eŭropa fenomeno kaj ankaŭ nuntempe havas siajn plej fortajn radikojn sur la malnova kontinento. Ĉar, tamen, laŭ sia destino la lingvo fariĝu tutmonda, necesus pli paroli pri la ekstereŭropa movado. Kaj feliĉe ĉiam pli kaj pli venas fortaj impulsoj kaj originalaj kontribuoj el neeŭropaj landoj, inter ili aparte el Ĉinio kaj japanio.

Mi tamen prezentu informojn kaj vidpunktojn pri la profilo de la Esperanta aktivado en eŭropa landa grupo, kie la Internacia Lingvo havas aparte fortan pozicion: Temas pri Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, BEA), Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ĈEA; Slovakia Esperanto-Asocio, SEA), Germana Demokratia Respubliko (Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, GDREA), Hungario (Hungara Esperanto-Asocio, HEA), Pollando (Pola Esperanto-Asocio, PEA), Soveta Unio (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, ASE).

Ni konsciu, ke la situacio de la internacia Esperanto-movado esence dependas de la internacia politika klimato, aparte de la rilatoj inter la du ĉefaj malsamsistemaj ŝtataj grupiĝoj. La malstreĉiga proceso de Helsinki, kvankam dum la lastaj jaroj konsiderinde malrapidigita, donis al la evoluo de la Esperanto-movado gravegajn impulsojn, kiuj efikadas pozitive ĝis la nuntempo.

Krome, la konkreta pozicio de Esperanto en unuopaj landoj dependas de tuta aro da objektivaj faktoroj, kiuj sin reciproke kompletigas aŭ ekskludas kaj ne nepre efikadas samtempe. Al ili aparatenas i. a. a) la politika sistemo de la ŝtato, b) la ekonomiaj kondiĉoj, c) la internacia pozicio de la ŝtato, d) la evoluonivelo de la tuta socio, laŭ klereco kaj vivnivelo, e) la lingva situacio kaj lingva politiko interne de la lando, f) la lingvopolitiko en internaciaj rilatoj, g) historiaj tradicioj, h) etnaj specifaĵoj k. a. Krome, kompreneble, ankaŭ subjektivaj faktoroj povas ludi relative gravan rolon, ekz. a) antaŭjuĝoj resp. pozitiva sinteno de gravaj politikistoj kaj sociaj eminentuloj pri la lingva problemo ĝenerale kaj aparte pri Esperanto, b) manko aŭ ekzisto de seriozaj kursgvidantoj, science trejnitaj homoj, lertaj propagandistoj kaj aliaj aktivuloj k.s.

2. Kvankam la menciitaj objektivaj kaj subjektivaj faktoroj en la menciitaj socialismaj landoj ne efikadas tute unuece sed ofte iom diferencige — foje regresige, foje impete progresige, ne malofte kontraŭdire — eblas tamen elstarigi kelkajn relative komunajn trajtojn:

2.1. La Esperanto-organizaĵoj de la menciitaj landoj ne funkcias izolite de la socia vivo sed estas integra parto de ĝi. Ekzistaj fruktodonaj ligoj al prestiĝaj naciaj organizaĵoj (ni nur mencias kelkajn), ekz. en Bulgario al la Nacia Fronto (=tegmenta organiza formo de la partioj kaj plej gravaj amasaj organizaĵoj), en ĈSSR al la sindikataj grupoj en uzinoj kaj la packonsilantaroj, en Hungario al la sindikatoj kaj la packonsilantaro, en Pollando al la kultura ministerio kaj Pola Studenta Unuiĝo, en GDR al la kultura amasorganizaĵo Kulturligo, en Soveta Unio al la Unio de la societoj por kulturaj rilatoj kaj amikeco kun eksterlando, krome al la sindikato kaj junulara organizaĵo.

2.2. La Esperanto-movado prezentas specifan internaciecan kulturpolitikan aktivadon, kiu estas karakterizita per multflankeco kaj origina-





leco. Pro tio ĝi plej ofte estas pozitive akceptata socia partnero, kvankam ja ekzistas grandaj niveldiferencoj laŭ agadkampoj, konkretaj landoj, regionoj kaj lokoj.

Konsiderante certan labordividon inter la landoj kaj la tre intiman kunlaboron, la specifaj fortecoj (respektive malfortecoj) de unu lando en aparta agadokampo certagrade egaligas en alia. Pro tio certagrade la tuta menciita regiono profitas i. a. de jenaj aktivaĵoj:

2.2.1. Kulturaj, politikaj kaj movadaj publicaĵoj en Esperanto abundas. Nur sole en Hungario dum la lastaj 10 jaroj aperis pli ol 100 titoloj. En Soveta Unio aperas daŭre aktualaj politikaj dokumentoj kaj estas sinkronizitaj kelkaj informfilmoj De 139 periodaĵoj, listigitaj en la katalogo de la libroservo de UEA 1984/85 22 aperas en 5 landoj, t. e. 16 %. La plej multajn eldonas Hungario kaj Bulgario. Tiu ĉi materialo ludas gravan rolon por la internacia kulturpontiga rolo de Esperanto, alte taksata de UNESCO, kaj kontribuas al la pliriĉiĝo kaj evoluo de la lingvo kaj tiel al ĝia uzebleco kaj stabileco.

2.2.2. La saman rolon ankaŭ ludas la rilate al Esperanto tutmonde plej aktiva radio-stacio, Radio Polonia. La 23an de julio 1986 ĝi emisiis la 30.000-an disaŭdigon. Grandega kvanto da parolita Esperanto, grava ankaŭ i. a. pro la evoluiga, aktualiga kaj prononcnormiga influo de la disaŭdigoj je la lingvo mem.

2.2.3. Aparte gravan rolon ludas en la menciita regiono la turismo per Esperanto.

La „turisma Esperanto-kalendaro" eldonita de Monda Turismo 1986 en Bydgoszcz (Pollando) registras 367 diversspecajn internaciajn turismajn, kulturajn kaj klerigajn aranĝojn en 26 landoj. Nur en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Pollando, do en 5 landoj, okazas 241 (kompreneble malsamnivelaj) internaciaj aranĝoj, do 65 %.

2.2.4. Abundas teatraj grupoj, korusoj, pupteatroj kaj aliaj kulturaj iniciatoj, kiuj ankaŭ internacie, ekz. dum Universalaj Kongresoj, prezentas sian arton.

2.2.5. En Bulgario, Hungario kaj Pollando la instruado de Esperanto, parte laŭ ŝtataj instruplanoj, kaj la edukado kaj kvalifikado de la instruantoj, en tutmonda skalo estas plej progresinta. En Bulgario kaj Hungario en multaj lernejoj Esperanto estas la tria libere elektebla fremda lingvo. En Budapeŝto en la ŝtata universitato ekzistas la ebleco oficiale diplomiĝi kiel plenrajta instruisto de Esperanto por gimnazioj.

2.2.6. Ne laste menciindas la certa apliko de Esperanto por fakaj celoj, ĉu komputado, medicino, agrikulturo, fervojismo, filologio k. a. Apartan rolon ĉi-rilate ludas Hungario. Impulsoj por levi la kreadon de fakterminoj sur pli altan nivelon lastatempe venas el GDR.

2.2.7. En Hungario, Soveta Unio kaj GDR laboras oficialaj aŭ duonoficialaj instancoj pri la sciencaj aspektoj de la internacia lingva komunikado kaj pri Esperanto eldonante verkojn pri interlingvistiko kaj esperantologio.

2.3. Pro tiuj aktivecoj kaj por certigi ilin la Esperanto-organizaĵoj en la 6 landoj — kvankam kun diferencoj — ricevas konsiderindan moralan kaj materian ŝtatan subtenon, ĉu rekte per ŝtataj instancoj aŭ pere de amasaj organizaĵoj.

2.4. La priskribita situacio permesas al ĉiuj menciitaj 7 asocioj posedi proprajn oficejojn

kun profesia oficistaro, en kelkaj asocioj inter 10 aŭ eĉ 25 plentempe pagitaj personoj, en tuta Bulgario eble eĉ 60. Aparta atingo estas la tutjare funkcianta „Internacia Esperanto-Lernejo" en Pisanica ĉe la bulgara urbo Smoljan. La moderna domo kun pli ol 200 litoj estas propraĵo de Bulgara Esperanto-Asocio.

2.5. Verŝajne ĝenerale ne eblas paroli pri amaseco rilate al la Esperanto-movado. Tamen, en la kadro de la propraj limoj de la movado, certan amasecon atingis la soveta kun 10.000, la pola kun 8.000, la bulgara kaj hungara organizaĵoj kun po 6.000 membroj. Se oni aldonas la 2.000 membrojn de la ĉeĥa, 3.000 de la slovaka asocioj kaj 1.700 de GDREA, oni havas preskaŭ 37.000 organizitajn esperantistojn nur en la 6 socialismaj landoj. La plej amasaj Universalaj Kongresoj post la dua mondmilito, kun 3.000 ĝis 5.000 partoprenintoj okazis 1959 en Varsovio (3.256), 1963 en Sofio (3.472), 1966 en Budapest (3.975), 1978 en Varna (4.414) kaj denove 1983 en Budapest (4.834).

2.6. Grava faktoro por la multflanka funkciado kaj plua kvanta kaj kvalita kreskado de la Esperanto-movado en la eŭropaj socialismaj landoj estas sendube la relativa intensa kunlaboro de la asocioj. Diversebenaj amikeckontraktoj, oftaj kontaktoj inter la membroj kaj la regulaj konsultiĝoj de la ĉefaj funkciuloj de la asocioj plifaciligas ĉi-tiun kunlaboron. La jam tradicia sistemo de ĉiujaraj konsultiĝoj — la 19a okazis dum aprilo 1986 en Poprad (Ĉeĥoslovakio) — estas intensa spertinterŝanĝo por pli bone fruktuzi la menciitajn komunajn kaj diferencajn trajtojn en la intereso de la internacia Esperanto-movado kaj en la intereso de la unuopaj organizaĵoj de la partoprenantaj landoj mem.

2.7. Oni sendube povas diri, ke la Esperanto-movado en la menciitaj landoj — kvankam kun certaj diferencoj — ĝuas relative altan ŝtatan rekonitecon. La ŝtato kaj ŝtataj organoj rigardas la Esperanto-movadon ne sekto de stranguloj sed serioza kultura faktoro. Certagrade tio ankaŭ validas por la amasmedioj, kvankam tie tamen foje la subjektiva faktoro ludas grandan rolon. Ankaŭ sciencaj institucioj jam pli kaj pli rekonas la fakton, ke pri la fenomeno de funkcianta planlingvo, science priskribebla kaj priskribenda, unuavice kompetentas tiuj homoj, kiuj konas kaj uzas ĉi-tiun lingvon. Tio, tamen, ne ekskludas ankoraŭ la ekziston de konataj antaŭjuĝoj.

Retrorigardante la historion de la Esperanto-movado, aparte dum la lastaj jaroj, oni rimarkos, ke ankaŭ la organizaĵoj de la socialismaj landoj klopodas pli forte doni sian kontribuon al la internacia Esperanto-movado. Elokventa pruvo i. a. estas la lasta rezolucio de UNESKO, kiun aparte proponis — laŭ la stimuloj de la landaj asocioj aŭ unuopaj eminentaj aktivuloj — Jugoslavio, Bulgario, Ĉinio, Hungario, Pollando, Kostariko kaj San Marino, do inter ili 3 el la menciitaj 6 eŭropaj socialismaj landoj. Sed,

sendube, la kontribuo povus esti ankoraŭ pli granda.

3. Kiuj estas la kaŭzoj por la priskribita situacio? Reatentigante pri la komence menciitaj objektivaj kaj subjektivaj faktoroj kaj pri la diferencoj inter la landoj, ni ŝatus resumi tiel:

Laŭ mia opinio de granda graveco estas la ekzisto de la sama politikekonomia sociorda tipo — de la socialisma sociordo — kvankam en la unuopaj landoj ne mankas diferencoj en la konkreta realiĝado kaj manifestiĝo. Tio signifas pli detale:

3.1. La teoria bazo de la socialisma ŝtato, la marksismo-leninismo, ne posedas unuecan aŭ pretan teorion pri la problemo de internacia lingvo, kvankam ne mankas diversvidpunktaj aludoj aŭ fragmentoj ĉe diversaj aŭtoroj. Marx kaj Engels mem nur periferie menciis en aliaj kuntekstoj universalan lingvon. Por ili, poliglotoj, ne ekzistis lingva problemo. Kaj la demando siatempe ne estis primara.[1] Tamen, gravas la alineo de Marx en la komune kun Engels skribita verko „La germana ideologio", pri la signifo de konscia reguligado de la lingvo. Marx skribas „La natura kreskinteco de lingvo cetere estas nuligita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistinta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla; parte pro koncentriĝo de la dialektoj interne de nacio al nacia lingvo, baziĝanta je ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe prenos ankaŭ tiu produkton de la speco sub sian regon, kompreniĝas el si mem".[2]

Tiu ĉi opinio de Marx tre influis la marksisman lingvosciencon, kie oni ĝenerale agnoskas la fakton, ke la homo kapablas — certagrade — konscie influi la evoluon de lingvoj. De tiu agnosko al la konstruo de planlingvo nur estas kelkaj paŝoj, kvankam kvalite gravaj.[3]

3.2. Kvankam ekzistas legendoj, ke Lenin sin esprimis por aŭ kontraŭ Esperanto, sovetiaj esploristoj montris, ke similaj asertoj ne estas pruveblaj.[4] Multe pli gravas la instruo de Lenin

pri la samrajteco de nacioj kaj lingvoj. Estas konata i. a. lia eldiro: „Kiu ne agnoskas la samrajtecon de nacioj kaj de lingvoj kaj tion ne defendas, kiu ne kontraŭbatalas ĉiun ajn nacian subpremon aŭ nesamrajtecon, tiu ne estas marksisto, tiu eĉ ne estas demokrato".[5] Estas konataj la grandaj klopodoj post la revolucio en Soveta Unio, doni al pli ol 40 antaŭe senskribaj lingvoj alfabeton kaj konscie evoluigi multajn lingvojn en Soveta Unio, antaŭe subevoluintajn. Finfine en tiu ĉi landego estas 130 lingvoj![6]

La spirito de la leninisma nacia politiko principe favorigas la klimaton kaj la komprenon pri internacia lingvo.

3.3. Tre grava por la sinteno al la problemo de internacia lingvo estas la prognozo pri la estonteco de la homaro. Kun negativa socia prognozo oni eble venos al la fatalisma konkludo pri la senelira hegemonio de la angla aŭ de 2-3 mondaj lingvoj.

Tiam ne restas loko por Esperanto. Ŝajnas al mi, ke pozitiva socia prognozo inkludas la koncepton pri paca kunekzistado de malsamsociordaj ŝtatoj. Ĝi inkludas la daŭran plidemokratiiĝon de la internacia rilatoj. Kaj tio favorigas ankaŭ la sendiskriminacian internacian lingvon. La marksismo-leninismo kiel instruo kaj la praktika politiko de tiuj socialismaj ŝtatoj, pri kiuj mi parolis, favorigas la pacan kunekzistadon.

Cetere, la konata slogano de Marx/Engels, presita sur la Komunisma Manifesto, enhavas interlingvistikan komponenton: „Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!" Transnacia unuiĝo postulas transnacian komunikadon.

3.4. De granda graveco por la principe pozitiva sinteno de unu lando el la sendiskriminacia solvo de la internacia lingva problemo estas la lingvopolitika situacio de la nacia lingvo, ĝia internacia pozicio. La naciaj lingvoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio (la ĉeĥa kaj la slovaka) kaj Pollando kaj aparte de Hungario havas internacie preskaŭ nulan pozicion. Tiuj landoj tre bone komprenas kaj spertas la negativajn efikojn de la lingva problemo.

Ankaŭ pro tio la ĝenerala kompreno pri la avantaĝoj de Esperanto en ĉitiuj landoj estas relative granda, sendube pli granda ol ekz. en GDR, kies nacia lingvo, la germana, tamen ankoraŭ apartenas al la „Klubo de la mondlingvoj".

3.5. La principo de la demokrata centrismo, laŭ kiu la ŝtatoj, kun landaj modifoj, funkcias, havas avantaĝon por la centrigo kaj efikigo de la relative malmultaj movadaj fortoj. Ĝi havas krome avantaĝon por la laboro kun la amasmedioj, kun sociaj organizaĵoj, sciencaj institucioj k. s.

3.6. De nesubtaksebla valoro estas la rilatoj inter laborista movado kaj Esperanto-movado, aparte dum la 20aj kaj 30aj jaroj de nia jarcento. La tre dinamisma laborista Esperantomovado, kun socialdemokrata, komunisma, anarkisma kaj aliaj komponentoj, per multaj konkretaj agoj montris la praktikan socian valoron de Esperanto por progresemaj celoj. Ni nur menciu la rolon de Esperanto en la batalo kontraŭ la faŝismo aŭ en la hispana milito kontraŭ Franco.

3.7. Kaj laste de avantaĝo por la evoluo de la Esperanto-movado en la socialismaj eŭropaj landoj sendube estas ilia teritoria kunligiteco, kiu plifaciligas la aplikon de la lingvo.

4. Jen la resuma kaj certe mankhava provo iom skizi la ĉefajn karakterizaĵojn de la Esperantomovado en malgranda sed tre aktiva eŭropa ŝtata grupo kaj eventualajn kaŭzojn. Ni tamen konstatu: Ne tiom gravas, kies kontribuo al la evoluigo de la tutmonda uzateco de Esperanto estas pli granda aŭ malpli granda. Gravas, ke ĉiu faru sian eblon utiligante la specifajn konkretajn kondiĉojn. Sed plej grava: ĉiuj klopodoj por Esperanto estas vanaj, se la homaro ne sukcesas bridi unufoje por ĉiam la danĝeron de la nuklea memdetruo.

Notoj

1) Kp. D. Blanke: Karl Marx kaj Friedrich Engels pri la „Langue universelle". En: „der esperantist", Berlin, N-r o 122 (6/1983), p. 121-126.
2) Esperantigo laŭ la germana originalo el: Marx, K./Engels, F., Die deutsche Ideologie. Marx-Engels-Werke, vol. 3, p. 448, Berlin. Dietz 1973. Pri la ĝusta traduko de ĉi-tiu teksto kp. la kontribuojn en GDR-Paco, Berlin 1983, 1984, 1986.
3) Kp. D. Blanke, Pri la problemo de laŭplana influado je la lingvoevoluo fare de la homo. En GDR-Paco, Berlin, 1981, p. 24-31.
4) Kp. S. N. Podkaminer, Lenin kaj Esperanto. En: D. Blanke (REd.), Socipolitikaj aspektoj de la Esperantomovado, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986, p. 31-49.
5) Esperantigita laŭ W. I. Lenin, Kritische Bemerkungen zur nationalen Frage, Berlin. Dietz, 1951, p. 14 (Kritikaj rimarkoj pri la nacia demando)
6) Kp.M.I. Isaev, National Languages in the USSR. Problems and Solutions, Moscow: Progress, 1977

Prelego prezentita antaŭ la 73-a Japana Esperanto-Kongreso en Osaka.

La supran artikolon ni represas el „der esperantist" 1986/6.

Simo Milojević

Ĝenerala Direktoro de UEA

Kubo havas amasan Esperanto-movadon

Laŭ invito de la Kuba ŝtata Fremdlingva Eldonejo „José Marti" kaj Kuba Esperanto-Asocio, mi pasigis dek tagojn, de la 9a de septembro 1986, en Kubo. Mi akceptis fari tiun vojaĝon, kiun komplete financis la invitintoj, kun supozo, ke mi havos almenaŭ kelkajn tagojn por ferii kaj ripozi post la streĉa Kongreso en Pekino. Okazis male: mi foriris el Kubo pli laca ol mi venis tien. Mi tamen ĝojis pro tio. Jen iom da kialoj:

Kiam oni dum jardekoj tiel insiste kaj spite ĉion praktikas la ekskluzivan profesion de esperantisto, kiel okazas al mi, oni ne atendas surprizojn en la Esperanto-movado. Surprizoj tamen embuskis almenaŭ trifoje en la lastaj kvin jaroj: en 1981 Brazilo rivelis, ke ĝi movade fortas kiel duono de Eŭropo; en julio ĉi-jare Ĉinio pruvis sin esti movada grandpotenco; en septembro ĉiuj fabeloj pri amasa Esperanto-movado en Kubo montriĝis esti veraj kaj realaj.

Jam ĉe la flughaveno, alvene, je la unua en la nokto, salona akcepto anstataŭ dogana kaj pasporta kontroloj, bonveniga parolado, aŭtomobilo kun ŝoforo. Kiom ajn private mi malsopiras (malŝatas) tian pompon, ĝi estas bonvena kiam oni tiel volas honori UEA aŭ Esperanton. Jam tie en la flughaveno kaj survoje al luksa hotelo mi spertas mian unuan Kuban ŝokon, ĉar mi renkontas s-ron Félix Sautié Mederos, direktoron de la Fremdlingva Eldonejo. Kvankam li ne parolas Esperanton, li scias ĉion pri ĝi kaj pri la Movado. Li ŝokas min per la detaleco de siaj demandoj, per moderneco de sia movada strategio, per fajro en siaj karaktero kaj agstilo, per tiu rara kapablo ne akcepti, ke ekzitas demandoj nesolveblaj. Nun, multajn semajnojn poste, mi pensas pri Kubo, kiel pri „lando de Félix", kvankam ni du ne ĉesis kverele argumenti dum tiuj dek miaj Kubaj tagoj.

Laŭ la densa programo, kiun oni enmanigas al mi frumatene, mi pasigos la unuan tagon ĉe la 3a Internacia Libro-Foiro de Havano, en la ekspoziciaj salonegoj de la moderna, arkitekture tre sukcesa Palaco de Kongresoj. Esperanto tie ricevis belan standon en okulfrapa loko, kun cento da elektikaj titoloj (donacitaj ĉefe de UEA). Svarmas ĵurnalistoj kaj filmistoj ĉe la stando, kiun prinotas la televido, radio kaj preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj. Dum la foira semajno disdoniĝos tuta dekmilo da informiloj pri la Internacia Lingvo.

Ni flugas la postan matenon al Kamaguejo, 600 kilometrojn oriente de Havano. En solenaĵo vespere tie mi prelegas al cento da esperantistoj kaj aŭdas detalan raporton pri la loka Movado. „En la nuna dato la diplomitoj de la tria nivelo en Kamaguejo sumiĝas je 135", mi nun relegas en la teksto de tiu raporto. Troviĝas tie ankaŭ kompletigoj por la historio de Esperanto en Kubo: .. En 1895... tien ĉi sendis la hispanaj registoj multe da ĉiaj soldatoj..., inter tiom da militistoj alvenis esperantisto. Laŭ rakontoj de tiamaj loĝantoj en la vilaĝo Minas, norde de Kamaguejo, li estis ano de Bataliono de Madridaj Volontuloj. Kiel li nomiĝas? Nu, bedaŭrinde, tiu parto ne estis memorata fare de atestantoj! Sed supozeble la nomo estus José Soler Valls, aŭtoro de klasika lernolibro de Esperanto, hispano, kiu en sia junaĝo partoprenis en tiu milito." Raúl Juárez Sedeno, kiu verkis la raporton, iama UEA-peranto en Kubo, kapablas elĉerpe kaj kompetente paroli pri la longa historio de Esperanto en Kubo kaj Kamaguejo. Oni ne lasas min foriri post la prelego. Amaso da demandoj leviĝas, ĉiuj en bona Esperanto, kvankam mi estas eble la tria aŭ kvara eksterlanda esperantisto, kiu vizitas Kamaguejon post José Soler Valls en 1895.

En Ciego de Ávila, dum reiro aŭtomobile al Havano, denove atendas grupo da movadaj aktivuloj, kelkaj el aliaj urboj, kiujn ni ne vizitos. Tie mi rapide renkontas ankaŭ s-ron Pedro Pablo Lamas Díaz, ĝisnunan peranton de UEA, kiu dum multaj jaroj estas unu el la ĉefaj movadaj aktivuloj en la lando. Ni ambaŭ bedaŭras, ke mi rapidas al Santa Clara, urbo je 200 km antaŭ Havano. Tie atendas nin plenplena salonego da entuziasmaj, ĉefe junaj, geesperantistoj. Urba koruso bonege kantas la Esperantan kaj kuban himnojn, parolas s-ro Jesús A. Castillo Jiménez, nova prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio (li akompanis min ankaŭ al Kamaguejo), poste parolas i.a. mi. Leviĝas aro da demandoj el la publiko. Sekvas altnivela

muzika programo kaj akcepto kun urbaj gravuloj, tiel ke ni sukcesas daŭrigi nian veturon al Havano nur iom antaŭ la noktomezo, lacaj sed kontenaj.

Maritza Gutiérrez González: *La plej granda propagando por esperantistoj estas, ke ili povu aĉeti ĉie ion por legi, sed ke vere ili povu ĝin aĉeti; hipoteze oni povas mendi ĉion, sed ne ĉiuj povas atingi konverteblan monon. Tio estas unu el la ĉefaj elreviloj kuŝantaj ĉe ni. Alvenas enlanden faldfolioj, katalogoj kaj — eventuale — revuoj senpage, kiujn la asocioj distribuadas juste. Sed, tio aspektigas la landajn asociojn (kiel la nia) mizeraj kaj nekapablaj akiri la necesajn soifsatigajn legmaterialojn por la legdezirantojn; do, malfacilas, ke en landoj de subdisvolvitaj ekonomioj aŭ en landoj survoje al disvolvo ekestu iu elstarulo pri Esperantaj aferoj, ĉar la sufiĉaj rimedoj malproksimas nur pro manko de valuto por akiri bibliografian materialon kaj ceterajojn.*

La 14an de septembro, en la Palaco de Kongresoj en Havano, okazas modele preparita Laborkonferenco de Kuba Esperanto-Asocio. Referas tie: Maritza Gutiérrez (Propaganda profilo de la Esperanta movado), Julian Hernández (Instruado de Esperanto en Kubo) kaj Andrés Pinera (Gramatikaj tradukaspektoj el la hispana al Esperanto). Ĉar en la salonego estas ankaŭ kelkseko da invititaj reprezentantoj de ŝtataj kaj urbaj aŭtoritatoj, de sciencaj institucioj, ĉar ĉeestas televidaj kaj gazetaraj raportistoj, ĉiuj prelegoj disponeblas en Esperanta originalo kaj en hispana traduko. Kiam venas mia vico paroli, montriĝas, ke la organizantoj pretas por samtempa interpretado. Denove ne mankas demandoj kaj diskuto — ĉio en bonnivela Esperanto.



Simo Milojevič subskribas kontrakton kun Kubaj esperantistaj gvidantoj

Kelkajn postajn tagojn mi pasigas vizitante diversajn instancojn kaj institucioj, prelegante denove antaŭ Havanaj esperantistoj en la Nacia Biblioteko. Kiam mi en la Ministrejo pri Komunikado volis levi la demandon pri eventuala poŝtmarko omaĝe al nia Jubileo, montriĝis ke ĝi jam estas desegnita por aperi en marto 1987. Kiam mi renkontis la prezidanton de la Nacia Unesko-Komisiono, montriĝis, ke tiu dokta damo, kiu profesoras pri la klasika filologio en la Universitato de Havano, informiĝis pri Esperanto jam en 1928, kiam ŝia studenta kolego verkis universitatan disertacion pri la Internacia Lingvo. Ankaŭ la vicministro pri kulturo, kiun mi rekontis, montriĝis informita pri Esperanto, dum la estrino de la eldona fako de la Centra Komitato de la Kuba Komunista Partio (ŝi sidis ĉe la prezida tablo de la Laborkonferenco de KEA) mem komencis studi la lingvon.

Pro la denseco de la programo, mi preskaŭ devis defendi min de intervjuoj en Kubo. Nek eblis — nek mi volis — rezigni pri 20-minuta intervjuo en unu el la plej popularaj programoj de la Kuba Televido je la 6a horo vespere, kion oni konsideras maksimume konvena tempo. Mi iom miris pro la fakto, ke temis pri intervjuo elsendita rekte, vive, en Esperanto, kun hispana interpreto kaj partopreno de la prezidanto de KEA. Longa intervjuo aperos ankaŭ en la revuo de la Nacia Unesko-Komisiono.

Julian Hernández Angulo: *Dum la jaro 1984, matrikuliĝis (enskribiĝis) en niaj kursoj 2067 gelernantoj. En tiu jaro finas la unuan nivelon 737 gelernantoj, la duan 489, kaj la trian 161. En la jaro 1985, la matrikulo estis 2146 gelernantoj. Finas la unuan nivelon 931, la duan 476, la trian 405 gelernantoj. En la unua semestro de 1986 la matrikulo estis 917 gelernantoj. En junio la unuan nivelon finis 257, la duan 238, kaj la trian 133 gelernantoj. Nun ekzistas Esperanto-lernejoj en 12 provincoj de la lando.*

En la antaŭlasta posttagmezo de mia restado en Kubo, mi post kvereleto kun tiu verva Félix el la komenco de ĉi tiu teksto, tamen sukcesis eskapi la solenan fermon de la librofoiro kaj veturi dufoje 150 km. Mi vizitis Varadero, ravan, kilometrojn longan strandon de filigrane fajna sablo, kun la maro, kiu gamas ĉiujn nuancojn de bluo kaj verdo. Dum mi rajdis ondojn ĉe unu el la plej belaj strandoj de la mondo, Félix sakris en Havano, ĉar li estis aranĝinta, ke mi en la fermo de lia librofoiro

renkontu la kuban ministron pri kulturo. Félix kaj mi poste kverelis pri la demando, ĉu mi maltrafis la ministron aŭ la ministro maltrafis min. Miaflanke, Varadero valoris tiun alian maltrafon.

Sed, kiel ni ĉiuj sukcesis maltrafi Kubon ĝin nun? Kiel eblas, ke potenca, amasa Esperanto-movado kreiĝas en lando, kiun oni provas izoli politike kaj ekonomie dum la lastaj jardekoj, kiun ankaŭ ni — eble nekonscie — izolas de la internacia Esperanto-movado? Jes ja, ni sidas kaj atendas, ke la Movado en Kubo mem solvu siajn problemojn. Ĝi ankaŭ faras. Mi vidis tie lernolibrojn kaj vortaron represitajn en Kubo. Mi ne diros pri kiuj libroj temas, ĉar mi ne volas denove inciti tiun unuflankan predikadon pri la piratajn eldonoj. Ĉu ni petu la kelkmilan Kuban esperantistaron atendi kelkajn jardekojn ĝis la internacia ekonomia malordo fariĝos ordo kaj ebligos, ke ankaŭ kubanoj kaj afrikanoj kaj hindoj kaj ĉinoj povu aĉeti Esperantajn librojn eldonitajn en Japanio kaj Nederlando? Kubanoj ne pretas atendi. Prave. Ili volas legi kaj agi nun. Ĝojige.

Kuba Esperanto-Asocio volas inviti Universalan Kongreson. Kial ne, diris mi tie. Félix volas ĝin jam postmorgaŭ aŭ minimume en 1988. Tio ne eblas, mi klarigis, ne eblos verŝajne-ĝis 1991 aŭ 1992. Félix ne konsentas. Li ne volas cedi. Li jam vizitis Varsovion en oktobro, li aliĝis al la Kongreso tie en la Jubilea Jaro. Tamen, kelkajn horojn antaŭ mia reflugo el Kubo, Félix Sautié, Jesús A. Castillo (prezidanto de KEA) kaj mi subskribis oficialan protokolon pri mia vizito kaj la interparoloj. Tiu dokumento antaŭvidas, ke KEA dum la venontaj kelkaj jaroj organizu aliajn regionajn kaj internaciajn Esperanto-aranĝojn antaŭ ol gastigi Universalan Kongreson. Sed estas ja evidente, ke Kubo meritas la Kongreson kaj ke Kuba Esperanto-Asocio bezonas ĝin. Ni iru kun niaj Kongresoj tien, kie ili signifas ion ankaŭ por la Movado kaj ne nur por la kaso de la kongresurbo. Ĉiuj niaj lastatempaj „eksperimentoj" ĉikampe estis plenaj trafoj: Brazilo estis sukceso-en 1981, Pekino same en 1986. Kial ne Kubo en 1992? Ni povus esti inspiro por la Kuba Esperanto-movado, ĝi meritas iĝi inspiro por ni.

Represo el „Esperanto" 1986/6.

GRANDAJ LIBRODONACOJ

Okaze de la Jubilea Jaro Hungara Esperanto-Asocio por elmontri sian solidarecon, decidis donaci gravajn librokvantojn al la Esperanto-organizaĵoj de Kubo, Mongolio kaj Vjetnamio. La unuaj libropakaĵoj jam estis ekspeditaj — kompreneble ankaŭ la sendkostojn pagas HEA.

Al **Kubo** iras 31 titoloj en po 10-50 ekzempleroj — entute ĉ. 1200 libroj, inter ili tiel gravaj eldonaĵoj kiel *Gvidlibro por supera ekzameno, Enciklopedio de Esperanto, Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado* ktp.

Al **Mongolio** estis senditaj 7 titoloj en suma kvanto de 42 ekzempleroj, al **Vjetnamio** 30 titoloj en 590 ekzempleroj.

Krome dum 1987 la tri asocioj ricevados senpage la revuojn „Juna Amiko" kaj „Hungara Vivo" — al Kubo iros 100, resp. 40, al Mongolio 20, resp. 5, al Vjetnamio 50, resp. 20 senpagaj ekzempleroj.

Hungara Esperanto-Asocio esperas, ke la esperantistoj en la nomitaj landoj sukcesos bone utiligi tiujn materialojn, kaj ankaŭ tion, ke la hungara gesto trovos imitantojn ĉe aliaj landaj asocioj.

Jevgenij Vinokurov

* * *

Mi longe marŝos kun la regimento,
dum polvo, rosoj kirliĝas survoje,
kaj povas esti, ke min ama sento
abrupta tuŝos ie unufoje.

Steloza nokto, ventoza, malhela,
frapantajn flamojn mi nutre ekscitos,
la kapon kovras per kolum' mantela,
okul-ne ferme ĝis maten' mi sidos.

Kaj ĉio pasos. Matene post veko
mi mian lokon okupos, kun kanoj
la roto ekmarŝos, resonos la eĥo
de fajf', muziko de piedbatantoj.

En nokt' nebula, post kelkaj jaroj jam
ĉi sekreton kun amik' mi divids
pri ŝi, kiu mi renkontis iam,
kiu de mi neniam forgesitos.

El la rusa tradukis: Márton Fejes

NOVAĴOJ EL VJETNAMIO

Dum la lasta tempo la tutmonda esperantistaro malofte ricevas informojn pri la movado en Vjetnamio, kie iam funkciis unu el la plej aktivaj eldonejoj de Esperantaj libroj. Ĝuste pro tio kun granda plezuro ni ricevis la suban komunikon pri la elekto de nova Centra Komitato de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kiu havas — laŭ la informoj en la Jarlibro de UEA — 2400 membrojn plus 10 000 apogantojn. Jen, la komuniko:

La 25an de oktobro 1986 en Hanojo okazis amasa renkontiĝo, ĉe kiu estis prezentata la nova Centra Komitato de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kies prezidanto estas la poeto DAO ANH KHA.

Reprezentantoj de la Vjetnema Packomitato, kune kun tiuj de diversaj popolorganizoj kaj ŝtataj oficejoj ĉeestis la kunvenon.

La nova estrato de VPEA faris revuon de siaj aktivecoj, aldonis sugestojn al la asocia projekto por la venonta tempo kun la celoj disvastigi Esperanton en nia lando (precipe en Hanojo kaj en urbo Ho Chi Minh); samtempe plani aktivecojn de VPEA lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto okazonta en 1987 en Varsovio, ĉefurbo de la Popola Respubliko Polujo.

Konsisto de la nova Centra Komitato de VPEA:

Prezidanto: DAO ANH KHA (ĵurnalisto kaj poeto).

Vic-Prezidantoj: Prof. HOANG TUÊ (filologo, direktoro de la Vjetnama Filologia Instituto), NGUYÊN DUC QUY (publicisto, eks-vicministro pri kulturo), VU CÂN (ĉefredaktoro de „La Kuriero de Vjetnamio"), LÊ TUYÊT THANH (ĵurnalistino, vic-direktoro de la Oficejo por Eksteraj Rilatoj de Urbo Hô Chi Minh).

Ĝenerala sekretario: NGUYÊN DINH HIÊN (publicisto, vic-direktoro de la Hanoja Fremdlingva Eldonejo).

Konstanta sekretario: DANG DINH DAM

Komitatanoj: NGUYÊN HAI TRUNG (verkisto), NGUYÊN MINH KINH, BUI HANH CÂN (poeto), VU THANH HUONG (lingvistino), NGUYÊN NHU THU, TRÂN DANG KHOA, CHU THÊ GIANG (inĝenerio), NGUYÊN VAN THINH (pentristo).

Dang Dinh Dam

Post la kunveno, parto de la reprezentantoj de VPEA

Gyula Fekete (1922-)

BANAS SIN ĈA FIŜOJ



Ili akiris lokojn apud la fenestro; oni ne multopis en la vagonaro.

Ili brakume intimumis, foje-foje kisadis unu la alian, kaj senvoĉe gapis al la ekstero.

En la kupeo kunvojaĝis ankaŭ alia juna paro, ankaŭ ili brakumiĝis, interkisadis; do, dividiĝis la bonvola atento de la altestimata publiko.

Tie la knabo estis pli pasia, ĉi tie la knabino.

Tion eblas rimarki jam ĉe la unua alrigardo, se la diferenco estas granda. Ili mem ja ne multe konscias pri tio, kvankam jam de malproksime malkaŝas iliaj korpopozicio, movoj, mieno, tuta sinteno, kiu el ili estas la Suno, kiu la Luno.

— Vidu! — diris la knabino.

Sur la vivanta mapo reliefiĝis koloraj geometriaj figuroj: dehiskantaj florbedoj en la ĝardeno de la agrikultura produktokooperativo Sasad.

Poste denove: verdo, verdo, verdo. Kun ĉiuj nuancoj de la majaj verdoj brilis la sunplena pejzaĝo.

Ili tiris la fenestron malsupren, kaj kun krucitaj brakoj kubutante ili vizaĝ-al-vente rigardis la pejzaĝon malrapide retiriĝantan.

Iu maljunulino ekgrumblis pro la trablovo de la aero, ĉar ankaŭ transflanke oni malsuprentiris la fenestron. La alia juna paro malsuprentiris ĝin.

— Ni retiru ĝin, Bubu — diris la knabino maleme, kaj ŝi residiĝis sur sia loko.

La knabo kubutis plu, fermis la okulojn kaj tenis sian vizaĝon kontraŭ la vento.

— Bubu, trablovas la aero — flustris la knabino.

Tiom ili konversaciis ĝis Székesfehérvár. Ĉar eĉ tiu ĉi temo finiĝis ĉe tio, oni retiris transaflanke la fenestron.

Ili interkisadis kelkfoje, poste la knabo gapis eksteren al la pejzaĝo foraperanta. Eĉ nun la knabino plej ofte rigardis lin, sindoneme, amplene.

Post Székesfehérvár la knabo iris en la bufedon, kaj li revenis kun du boteloj da biero.

— Tiom estas por mi terure multe — diris la knabino.

— En tio vi ĉiam povas kalkuli pri mi, Bigyó.

— Do, en tio.

— En tio ĉefe.

— Kaj krome?... En kio krome?

Sencele muelante la nenion ili paroladis iom da, poste ili denove interkisadis kaj eksilentis. La knabo rigardis la pejzaĝon, la knabino la knabon, amplene.

Kiam trans la freŝa, verda branĉamaso ekbluis Balatono, la knabino demandis:

— Kion vi pensas, ĉu eblas jam baniĝi?

— Kial ne eblus.

— Ĉu la akvo ne estas malvarma ankoraŭ?

— Nu kaj? Baniĝi eblas.

— Brrr...

Ili rigardis la bluon miksiĝantan kun la nebulo. La horizonto tute malaperis, kvazaŭ tie en la malproksimo, trans la branĉaro de la arboj, videblus ne la akvosurfaco, sed la blua ĉielo.

— Cetere brilas la suno — diris la knabo poste, jam ĉirkaŭ Világos. — Ĝis vespere ĝi varmiĝos tiom apud la bordo.

— Brr...

— Sed vere. Ni povos mergi nin.

— Mi ne kunhavas bankostumon.

— Kaj kial ĝi necesus?

— Mi estas ja kulturestaĵo.

— Kulturestaĵo, ĉu?... Kial, se ni estas duope?

— Kaj krom ni ĉeestas la tuta granda publiko.

— Kiun interesas la publiko?

— Ili eksilentis.

— Ni enmergos nin — diris poste la knabo. — Ĉe la fino de la ĝardeno, tie estas Balatono. Maksimume de la kontraŭa bordo oni povus kaŝrigardi la sekretojn de via korpo, el Füred. Per teleskopo.

La knabino tiris sin al li.

— Vi estas fripona, sed tio aspektas bona.

Ili interkisadis.

Poste ili silentis, rigardis la pejzaĝon, la kvietan, vastan akvon, kiu per siaj diafanaj vaporoj solviĝis en la blua ĉielo.

— Morgaŭ universitata kontrollaboraĵo, kaj mi nepre... — komencis la knabino denove. — Kiam venos la vagonaro matene?

— Eĉ ne menciu tion. Iam je la kvina.

— Ve, ĉu entute estas vekhorloĝo ĉi tie?

— Ĉu vekhorloĝo? Kial?

— Ho vi, tio estas serioza. Kaj se ni pludormos?

— Bigyó! Ĉu vi volas dormi?...

Nun denove ne eblis preterlasi la interkisadon.

— Ĉu vi trinkos ankoraŭ? — demandis la knabo poste pri la biero. Ĝi estis jam la botelo de la knabino.

— Guteton nur. Sufiĉe, se vi lasos nur guteton en la fundo.

Ili preparis sin por elvagoniĝi.

La knabo demetis la pakaĵon, iun vojaĝtekon. Dume la knabino sin deturnis, ŝi senrigarde elprenis ion el la retikulo kaj englutis ĝin kun la lasta bierguto.

La kolonio estis senhoma, la stratoj malplenaj. Ĉie malsuprentiritaj ŝutroj kaj persienitaj fenestroj.

El la direkto de blanka-ruĝa, freŝe farbita boato alportadis la aerblovo vernisodoron.

Kie la trotuaro turnis sin rekte al la akvobordo, tie sur la angulgrundo aspergis malgranda maljunulo; laŭ la pumpado ritme knaradis la praepoka aspergilo. Tie kaj ĉi tie el la verda fono el-elbrilis la freŝaj blanka-ruĝa-blua-flava koloroj sur la ĵus farbitaj bariloj, terasoj kaj renversitaj, funkciprete atendantaj boatoj.

Sezonsopira silento ĉie.

Tiu ĉi silento daŭras de la dimanĉa vespero ĝis la vendreda vespero. Poste sekvas dutaga bruado, svarmo, jam kvazaŭ laŭ someraj dimensioj.

Nun estis silento ankaŭ sur la bordo. La kvieton de la naturo ĝenis nek homoj, nek vento. Sur la mildan, apenaŭ sulkiĝantan akvosurfacon klinis sin senmove la flavlanugaj salikobranĉoj.

Sur la apudborda grundo ĉiuj branĉoj estis jam plenfoliaj.

Flanke de la lago defendis ĝin, kontraŭ la norda vento, svingiĝantaj branĉotendoj de maljunaj plorsalikoj kaj Kanada poplo pleniganta la tutan ĉielon. La blondaj oleastroj, plantitaj iam ronde laŭ la barilo, sovaĝiĝis kaj fariĝis tien-reen fleksiĝantaj arboj kun senregula krono. La suda angulo de la grundo ankoraŭ gardis la restaĵojn de manplato da florĝardeno el la pasintaj jaroj; la arboj de la najbaro jam definitive kaŝis de ĝi la sunon.

Ĝuste tio plaĉis al la knabino: tiu branĉoplena romantiko.

— Beste bela — ŝi diris kaj nur rigardis supren al la branĉoj kovrantaj la ĉielon ĉie.

— Ĉu plaĉas ĉi tie?

— Beste bele.

Ili interkisadis. Dume la rigardo de la knabino haltis sur la dika, blankeca trunko de la poplo. Sur ĝi estis ĉizitaj linietoj, laŭvice unu sub la alia sur la krusto, kaj apud la kolumnoj de la streketoj staris literoj. La lastaj tri entranĉaĵoj, dense unu sub la alia, ŝajnis freŝaj, apude kun la litero CS.

La knabo brakumis ŝian kolon, kaj tiris ŝin kun si.

— Estu forta, Bigyó! La gemaljunuloj ankoraŭ ne komencis la sezonon.

— Kaj...?

— Ordo de malsupera kvalito. Araneaj retoj de plej supera klaso.

La tipmoderna dometo sufiĉe bone kongruis kun la sovaĝeska romantiko de la ĉirkaŭaĵo. Sur ĝia fasado al la lago vezikiĝis la stukaĵo, super la listelo de la bazo amasiĝis mapoj de sinsekvaj malsekiĝoj. Sur la ebena tegmento, evidente en la ŝtopiĝintaj defluiloj, verdis trudherboj.

Timiĝinte fuĝflugis hirundoj el sia nesto nun preparata en la interna terasangulo.

De la domfino portis la knabo eluzitan fosilon, kaj per ĝia tenilo li depuŝadis la konstruatan hirundoneston.

— Kial vi debatas ĝin? — demandis la knabino teruriĝinte.

— Mi spertas, Bigyó, ke vi havas grandan animon — diris la knabo. — Ĉu ne estas pli bone, se ili komencas konstrui novan nun? Ol somermeze? Kiam ĉi tie estos la plej granda trafiko!

Li facilmove ĵetis la fosilon al la trunko de la poplo, starigante ĝin en kumulon tie. Ĝi estis

verŝajne sabloamaseto, jam definitive plenkovris ĝin herboj.

— Nu, vidu! Eĉ ne parolante pri tio, ke ili plenfekas la tutan terason.

Interne fariĝis pli malvarmete, la aero odoris mucida.

Nudaj mebloj, nelavita mozaika ŝtonplanko. Kaj vere pendis araneaj retoj.

Ne reordita vasta sofolito. Senorde disŝutitaj buntaj litovestoj.

Sed pli ol io ajn fortis nun la sento, kiu kaptis ilin, kiam ili transpaŝis la sojlon: esti en duopo.

En duopo, fine. La unuan fojon tiel solaj, tiel sendepende de la mondo.

Ili interkisadis.

La knabo manpremadis la mamojn de la knabino, kisadis ŝian kolon, li volis jam eĉ pli.

La knabino liberigis sin perforte.

— Bubu, kiel vi povas esti tia?

— Kial? Kia?

— Ni restos kune la tutan tagon, ĉu ne?

— Bone.

— Kaj la tutan nokton...

— Bone — diris la knabo kolere. — Mi konas tiun ĉi turnon, se vi ne havas alian ideon, estas bone.

— Murmuranta Mordemulo — flatis la knabino. — Sed mi repacigos vin, ĉu bone?

Ŝi komencis la purigadon ĉe la lito, ŝi elpakis la litaĵojn sur la terason.

Per la balailo ŝi deprenis la araneajn retojn, ŝi reordigis iomete la ĉambron, eĉ lavis la ŝtonplankon. Poste sekvis la kuirejo, kaj kiam la knabo postiris ŝin, la pasintfojaj seka pano, ŝima marmelado, malplena konservskatolo, nelavita manĝilaro ne plu estis jam sur la tablo.

La knabino elpakis el sia teko la kunportitan manĝaĵon.

— Ĉu ni prefere manĝu ion?... Antaŭ ol vi daŭrigus viajn celatingemajn kisojn?

— Vi estas aĉa cinikulino — diris la knabo.

Ili interkisadis iom mallonge, poste la knabino preparis la kafkuirilon, ŝi metis la ovojn kaj la parizan salamon sur la teleron, kaj la tranĉilon kun la netranĉita paneto antaŭ la knabo.

— Jen. Via tasko.

Dum ili manĝis, la kafo boliĝis.

Vaporis la agrabla aromo, inundis la briloj tra la malfermita fenestro. Inter la branĉoj trapikis la sunlumo al la aerumata litaĵo sur la teraso.

— Kiam vi renkontiĝis kun Csilla la lastan fojon? — demandis la knabino.

— Ĉu estas grave?

— Ne estas devige respondi, se vi ne volas.

— Mi respondos, se vi volas tion.

— Mi ne volas, se vi ne volas.

— Tio, kio okazis, ne estas grava, ĉu vere, Bigyó?

— Kaj tio, kio okazos?...

Forta plaŭdiĝo aŭdiĝis ekstere.

La knabo abrupre levis la kapon kaj aŭskultis tra la malfermita fenestro.

— Ho...

Plaŭdoj denove. Proksime, tre proksime. Ĉi tie rekte, ĉe la grundofino, apud la bordo.

— Ho... Banas sin la fiŝoj. Li jam eksaltis, kuris eksteren.

— Venu! Rapide!

Tra la grundo li kapriole kuregis al la bordo. La knabino stumbleme kuris post li.

— Ĉu estas problemo?... Kio okazis?

— Vidu — la knabo montris la malproksimiĝantan akvoturnon. — Banas sin la fiŝoj.

Rigardis la knabino, sed ŝi vidis nenion.

— Bona ŝerco, ili banas sin. Tial ili estas fiŝoj.

— Atendu! — La knabo kaŝis sin malantaŭ la trunko de iu borda saliko. — Atentu! Kaj ĉefe, ne moviĝu!

Ankaŭ la knabino kaŝis sin ĉe la arbotrunko. Ili senparole atentis la senvibran akvosurfacon.

— Ĉi tie estas ankaŭ bramoj — diris la knabo post iom da tempo. — Hu, kio estos ĉi tie vespere!... Ĉu vi vidas? Antaŭ la ŝtonoj.

La knabino rigardis la akvon, kaj nur nun ŝi rimarkis la ombrojn forŝvebantajn en la profundo antaŭ la ŝtono. Blueska-dorsaj, sveltaj fiŝoj naĝadis dise-mise, videble ekscititaj, kaj dum ilia zigzagado, turniĝado ek-ekbrilis en la sunlumo la arĝento de iliaj skvamoj.

— Hu, kiom da fiŝoj! — miris la knabino. — Neniam mi vidis tiom da fiŝoj en Balatono.

— Nur ĝisatendu la vesperon! Eĉ bolos la akvo.

Ili ne bezonis atendi ĝisvespere.

Kiam ili reiris al la teraso, la knabo ekhavis suspekton: ie, iom malproksime, kvazaŭ senĉese bruus la akvo.

Ili iris tien tra la najbara strato. La ondoj ronĝis la bordon ĉe tiu parto, kaj la akvo de la sunbrila, malprofunda golfeto brue susuris pro la amaso de la svarmantaj, baraktantaj fiŝoj.

Rande, en la borda karikejo frajis malgrandaj fiŝoj („Alburnoj" — diris la knabo fakece), aro da brilantaj arĝentkorpetoj baraktis inter la herbotufoj. Pli interne, en la malprofundejo, la akvo ŝaŭmis per la bramoj, kvazaŭ falegus sur ĝin ŝtormatakoj.

La knabino timiĝinte kaj sorĉite rigardis la baraktantajn fiŝojn, ŝi komprenis nur nun, kio okazas al ili.

— Ĉu... ĉu ili amoras nun?

— Ĉu vi ne sciis?

La knabo rigardis ne la svarmantajn fiŝojn/, li atentis pri la golfakvo pli interna.

Ili staris longe tie sur la bordo.

Post iom da tempo pli malproksime kirliĝis la akvo; grandega plaŭdo, kaj grase brilanta, orbruna korpo de dika karpo aperis super la surfaco, kaj rekte post ĝi alia, pli malgranda. Sed ili malaperis post palpebrumo da tempo, kaj en la sekva sekundo jam multe pli malproksime kirliĝis la akvo.

— Hu, tiu pezis eble kvar-kvin kilogramojn — diris la knabo. — Sed tri tutcerte.

— Kaj kiu el ili estis la knabino? — demandis la knabino.

— Se ili studis biologion, tiam la pli granda.

— Kial la pli granda estas la knabino?

— Mi eĉ vaporon de imago ne havas. Matriarkeco.

Ankoraŭ longe ili rigardis la plaŭdantajn bramojn kaj la amase baraktantajn alburnojn inter la karikostoploj.

— Kaj ĉu ili amoras nur tiel? — demandis la knabino.

— Kio: nur tiel?...

— Do... Nur tiel.

— Ĉu vi trovas tion tro moderna?

— Ĉe ili ĉiu knabo amoras kun ĉiu knabino, ĉu?

— Grupa seksumado. Ili informiĝis pri tio el la literaturaj gazetoj. Hejmenveninte la knabo ne residiĝis ĉe la tablo.

— Manĝu nur, Bigyó — li diris. — Baldaŭ venos ankaŭ mi.

La knabino enpensiĝante manĝadis la ovojn kaj la salamon, kaj ŝi cerbumadis pri tio, kiel strange, ke la fiŝoj tiel amoras unu kun la alia. Kaj ĝuste en majo kaj tiel samtempe.

Ŝi pinĉetis la manĝaĵon jam senapetite, kaj la knabo ankoraŭ ne venis.

— Bubu!... Kie vi estas?...

Nenia respondo.

— Bubu!...

Silento.

La knabino ektremis pro la granda silento. Eĉ ŝi mem ne sciis, kial ŝi ektimis, sed ŝin kaptis la sento, ke ŝi definitive restis sola en tiu fremda domo, kaj kun la sama timo en la okuloj, ŝi komencis serĉi la knabon.

Dufoje ŝi ĉirkaŭiris la domon, kaj dum longaj minutoj ŝi ne retrovis lin. Tamen la knabo staris tie sur la bordo; li staris senmove ĉe la trunko de la maljuna saliko, kun forkego en la manoj.

— Kial vi ne envenas jam? — demandis la knabino rigardante la forkegon kun teruro.

— Mi akiras unue vespermanĝon.

— Ne, ne, Bubu — timiĝis la knabino. — Serioze ne!

— Ĉu vi ne manĝas volonte fiŝaĵon?

— Tio estas alia afero. Nun ne, Bubu.

— Konfidu tion nur al mi, ĉu bone? — diris la knabo. — Kaj ne moviĝu, bonvolu!

— Bubu... Nun ne.

— Tamen ĝuste nun. Kiam estas ĉi tie fiŝoj, kion vi pensas?

— Kial vi estas tia?

— Vi eĉ imagon ne havas pri la lokaj cirkonstancoj, Bigyó. Kaj vi senĉese praktikas profundan emocian vivon. Aŭ mi diris jam tion, ĉu?

La knabino silentis, ŝi rigardis la knabon.

— Nu, bele eniru, Bigyó — diris la knabo. — Dormetu iom, aŭ mi ne scias, kion vi faru. Iros ankaŭ mi tuj, kiam... — li eksilentis, ĉar kelkajn metrojn de la bordo kirliĝis la akvo.

La knabino eniris en la domon, ŝi senpense trinksuĉetis la malvarmiĝintan kafon ĉe la tablo.

Ŝin logis la fenestro, sed ŝi decidis ne kaŝrigardadi. Ŝi iris en la ĉambron, kuŝiĝis dorse sur la sofolito, sur kiu ŝi jam aranĝis la aerumitan litaĵon.

Aŭ ekventis, aŭ nur ŝi imagis: ŝlimodoro kaj fiŝodoro plenigis la ĉambron.

El dormeto ŝi rekonsciiĝis pro la laŭta plaŭdego, baraktado, kaj saltante al la fenestro ŝi rimarkis sur la forkego la sinĵetantan fiŝon pikitan al la tero.

Naŭze ŝi residiĝis sur la sofolito.

Sensence. La tuto ne, absolute ne havas sencon — ŝi pensis nur tiel sen pensoj.

Iam tagmeze devos esti iu trajno reen.

Kaj se ne estos tagmeze, estos posttagmeze. Nun jam tutegale, la tempo pasos iel. Per buso ŝi eble kurus en la urbon — kvankam ankaŭ tio ne havas sencon.

Tiu ulo imagas, ke ankaŭ mi estos streketo sur la arbokrusto. Kaj finite.

Mi, la stultulino. Se mi ne estus sentinta tuj, sed tuje tuj... — ŝi ĉesis, ŝi laciĝis.

La ĉambro estis malseke malvarma kaj senespere nuda; estis nek kurtenoj, nek tapiŝoj, nek tablotukoj, nur la nudaj mebloj kiel en porhora hotelaĉo. Ŝi neniam vidis hotelĉambron interne, tamen estis konata tiu bildo, tiu etoso de ie; eble el romano, eble el filmo, de ie ĝi estis tre konata.

Ŝi atentis senvole eksteren: la fiŝo frapis ankoraŭ foje-foje. Ĉu sur la forkego...?

Ĝin serĉas la partnero ekstaze de tiam, ĝi naĝadas laŭborde freneze... cetere ankaŭ tio estas pluretaĝa stultaĵo, ĝi trovos alian, por ĝi estas tutegale, la tuta afero ne havas sencon, nenian, nenian sencon tio havas, la tuta vivo estas stultaĵo.

Ŝi prenis la tekon preta por ekiri. Kaj kiam ŝi sencele puŝis la manon en ĝin, enmaniĝis la buŝoŝprucaĵo.

Ŝi ŝprucis en la buŝon per ĝi, kaj komencis senvestiĝi. Frostotreme ŝi deĵetis ankaŭ la lastajn vestojn, ŝi ŝovis sin sub la aerumitan, ankoraŭ sunodoran peplomon, kaj laŭte frostotremante atendis la knabon.

El la hungara: Imre Szabó

POEMOJ DE LÁSZLÓ GYŐRI

VI ESTAS ILI

Vi estas ili. Kaj mi same ili.
Ili — mi. Ni en ligoj vivas.
Naŭ ĉu, aŭ cent? Jen nun fordrivas
aŭ — drivos unu, kaj li sin retiri

ne pretas al l' aliaj. Por ekzili
sin, li nervoze aldeklivas.
La sorto ankaŭ nin distrivas.
Ni multas, multo pretas nin azili.

Min pelas vi, aŭ pretas mi foriri.
Mi tolerita agresivas,
mi azilita emas malsimili,

do, nepre mi kun vi samkolektivas.
Kaj vi kun mi. Ni kunas brili
aparte, kiuj por samiĝi vivas.

PRUNARBO.

Maturigaj vivo kaj morto
prunarbo arkana
Ĉeradike fruktoj sunbrilo
folie nokto ĉiama

Maturigas vivan min morto
prunarba doloro
ferkaldrone bolas radikoj
tervaze foli-odoro

Maturigas mortan min vivo
prunarba arkano
ĝisproverbe staras ĝi nuda
mi estas eĉ ne la samo

Vivo morto min maturigas
prunarbo min fermas
per radikoj branĉoj folioj
sentempas eternas

KAŜHELPA TIMO

Ĉevoste-orele ni kaptis la porkon. Ĝi ŝrikis
kun vasta buŝego, ŝaŭme. Tiel ĝi kaŝhelpis.
— La maŝon! — Buŝangule preskaŭ ĝisgorĝe.
Ĝi ŝrikis pli kaj pli laŭte. Stertoris, kiam
la ŝnuregon volvante al trabo ni suprenlevis ĝin duone
en la aero. — La tenajlon, la nazringon! Ek, nu!
ni staris: patro, mi kaj la porko. Por certigi vivtenon.
Enmane iloj, la lerta tenajlo, la ringo
por la porko-nazo. Ĝi silentiĝis, nur kelk-kelk-
foje stertoris; suspekteme, sed kvazaŭ kviete,
kapitulace. La nazo ŝerce trema subtaso. En mi
abomeno kreskanta. — Enpuŝu ĝin! — kriis la
patro. Mi paliĝis. Li kaptis ĝin el mia mano, li indulgis
min, kvankam kolere. Du ŝrikoj, ĉielŝiraj, poste
stertoro, naz-skuado, honto, kaj ĝi jam mur-
muris interne. Kaj sileto...
Timo nin kaŝhelpanta. Tamen estus bone el-
lerni. Ne la nazdratadon, sed tion, ke mi
ne kaŝhelpu iun, donante min en la manojn.

Tradukoj de Imre Szabó

Géza Csáth
(1887-1919)

PATRINMURDO

Al Ernő Osvát



Se la patro de belaj kaj sanaj infanoj mortas frue, ordinare el tio rezultas malbono. Witman havis jam du filojn, kvar- kaj kvinjaran, kiam li adiaŭis la mondon en sunradia, nur iom venta novembra posttagmezo. Li mortis sufiĉe facile, kaj entute li postlasis nemulte da tristo. Lia edzino, la vidvino, estis bela virino, sed nature milda kaj forte egoisma. La edzon ŝi nemiam turmentis, sed ankaŭ neniam amis super certa grado. Ĉe viroj tio multe pli pardoneblas ol ĉe virinoj, kies tutan vivon pravigas, senkulpigas, eĉ valorigas tiu forta, kvankam multaspekte neracia sento. Ankaŭ s-inon Witman ni devas tamen pardoni, ĉar ŝi ja enmondigis du belajn kaj fortajn filojn. En la strato, kie ili loĝis en duetaĝa, kaduka domo kun ligna ŝtuparo, la blonda, funebre vestita s-ino Witman estis videble respektata. Kvankam origine la koksoj de ĉi tiu virino estis malfortaj, la okuloj infanaj. Mi diras, kiel homo: nek bona nek malbona. La du filojn ŝi same malmulte kisis kaj batis. Ili apenaŭ havis ion komunan, kiel iom post iom, ĉiam pli evidentiĝis.

La filoj iradis ludi al la najbaroj. Ili ne montriĝis dum longaj posttagmezoj, ĝis malfrua vespero. Ili parolis malmulte kaj nur inter si. En la nigraj okuletoj brilis la animo de Witman, la patro. Ili vagadis en subtegmentejoj, priflaris malnovajn kestojn, peladis katojn. Tra la truoj ili ofte postgrimpis la katojn eĉ ekstere sur la tegmento, ĝis la altaj fajrizolaj muroj, ĝis la strangaformaj, fumbuŝaj kamentuboj. Dum daŭris la somero, la knaboj iradis sin bani en la rivero, kapti birdojn en la arbaro. S-ino Witman donis al ili manĝi, kaj purajn subvestojn sabate vespere. Ŝi akompanis ilin al la lernejo je ĉiu enmatrikuligo. Cetere ŝi vivis silente kaj dikiĝis silente. Duonjaron post la morto de sia edzo ŝi konatiĝis kun bankoficisto, juna kaj bela viro kun razita mentono, larĝaj ŝultroj, sed kun delikata, rozkolora, knabineca vangohaŭto; s-ino Witman deziris kaj — malgraŭ sia tedo, eĉ laciĝo — koketis lin. La oficisto akompanadis, vizitadis ŝin, ricevante teon kaj kisojn. Pro enuo kaj pigro li ne forlasis ŝin.

La filoj de Witman malmulte zorgis pri sia patrino aŭ ties amanto; planojn kaj okupojn ili havis. Ili gimnazianiĝis, sveltiĝis. La etaj muskoloj streĉiĝis sur iliaj mallarĝaj, fortaj ostoj kiel ŝtala drato. Pri la lernado ili rapide pretis, kvaronhoro sufiĉis post la ellitiĝo. La lernejo ludis neniam rolon en ilia vivo. La vivadon mem ili rekonis kiel sinjoran okupon, kaj la tempon ili alformis senkonscie kaj frue al siaj propraj bezonoj.

En subtegmenta kaŝangulo ili aranĝis sian sorĉistejon. Sagoj, mitraloj, tranĉiloj, preniloj, kordoj kaj ŝraŭboj estis tie kolektitaj, kaŝitaj kaj klasitaj. En ventaj aŭtunaj vesperoj, fininte la manĝon — la patrino enprofundiĝis en ruĝe binditan germanan romanon —, ili mallaŭte, rapidpaŝe flugis surstraten, ekkure ĉirkaŭvagis la tutan urbon. Ili embuskis. Ili lazis kaj hejmenportis senmastrajn hundojn. Ligante la buŝon de la besto, ili etendis ĝin sur tabulo. Kiel fora lumo de malbenita kastelo en arbaro, ilia eta lampo helis en la bruna, humida obskuro de la granda subtegmento. Kaj la du knaboj komencis sian laboron kun singarda, ekscitita malrapido. Ili fendis la torakon de la hundo, sorbigis la sangon, aŭskultante dumlabore la hororan, senpovan ĝemadon de la besto. Ili ekzamenis la batantan koron, prenis enmanen la varman, moveman maŝineton, per etaj pikoj ili malfunkciigis la utriklon, la valvojn.

Neelĉerpeble interesis ilin la mistero de l' doloro. Kelkfoje ili turmentis ankaŭ unu la alian, laŭ interkonsento, per batoj aŭ pinĉoj. Turmenti bestojn fariĝis ilia serioza kaj natura pasio. Ili neniigis tutan legion da katoj, kokidoj, anasoj, per siaj ĉiam evoluantaj, specialaj metodoj. Kaj neniu sciis pri iliaj aferoj. Ili sciis kaŝiĝi sekure, kun vira prizorgo kaj pripenso.

Cetere en la domo oni malmulte zorgis pri ili. Sur la unua etaĝo loĝis maljuna tribunala oficisto, kiu malofte hejmis, kaj kudristino, kiu laboris kun kvar knabinoj. La dua etaĝo, krom la familio Witman, estis loĝata nur de la posedanto de l' domo. Junega homo, filo de l' eksposedanto, kiu nemulte zorgis pri la domo nek pri la loĝantoj. Teretaĝe troviĝis ejoj de vitristo kaj ŝtofovendisto. Neniu sciis, kiam estas klientoj en tiuj butikoj. La filoj Witman povis okupi la domon por si mem. En la malpura korteto neniam videblis homo. La sola sumako, kiu staris kortomeze, kaj kreskigis siajn burĝonojn, foliojn kaj florojn jam antaŭ tiom da jaroj, versajne sentis, ke ĉio ĉi ne estas en ordo. La vivo tamen pasis plu ankaŭ en tiu domo, kiel ĉie aliloke. Inter la loĝantoj estis nur la du knaboj, kiuj bone amuziĝis, kuraĝis pensi ankaŭ pri la morgaŭo kaj postmorgaŭo.

Iun septembran vesperon ili hejmenvenis kun ruĝaj vangoj, anhelante. Ili pene portis kun si kunligitan strigon. Ili estis grimpintaj por ĝi en la subtegmentejon de la malnova preĝejo. Jam tutan semajnon ili spuris ĝin, traktante, kiel ĝin kapti kaj mortigi. Ili sukcesis. Brilis la okuloj al ili, forton de viro ili sentis en la fortikaj ŝultroj, kiam post galopo laŭ mallumaj stratoj ili hejmenvenis kun la triumfo. Delonge interesis ilin la strigo. Gia kapo grandas kiel du okulegoj. En la cerbo kaŝiĝas mirindaj, antikvaj fabeloj. Gi vivas pli ol cent jarojn... Necesis, necesis strigo...

Jen strigo. Ili elŝiris po unu la brustajn lanugojn, observante, kiel ekbrilas unu post la alia koloraj fajroj de doloro en la okuloj de l' mistera birdo. Poste ili ĉirkaŭvindis per dratoj la flugilradikojn, la piedojn, la bekon, kaj longe, senvorte gapis la senmovigitan strigon. Ili parolis pri tio, ke la birdo ĝustadire estas nur domo, kien enloĝiĝis la Turmento por resti tie ĝis la mortigo de l' strigo. Sed kie Gi logas? Laŭ ĉia probableco en la kapo. Poste ili decidis lasi ĝin tie por la nokto, ĉar tiel estos bele kaj ekscite enlitiĝi. Fakte, ili senvestiĝis ekscitite, kaj poste nur tion ili aŭskultis, ĉu venas iu brueto el sub la tegmento. Streĉan elaston ili sentis etendiĝi en siaj membroj, kvazaŭ la

vane disipita forto de la ligita, konvulsianta besto glisus al ili, sur ilin. Tiel ili endormiĝis.

Ensonĝe ili kune laŭrajdis grandajn kampojn, sur la dorso de kolosaj blankaj ĉevaloj, en senbrida galopo. Ili deflugis de vertiĝe altaj montosuproj, kaj tranaĝis varmajn, sangajn marojn. Ĉiuj doloroj kaj suferoj ĉi-teraj konvulsiis, ŝrikis kaj hurlis sub la ĉevalaj hufoj.

Sunradia mateno alridetis ilin je la vekiĝo; ili facile elsaltis el la lito. La matenmanĝon ili petis de la servistino, ĉar s-ino Witman kutimis dormi ĝis la deka horo. Ili rapidis al la strigo, kaj nun ili jam finis dum unu horo. Unue ili eligis la okulojn, poste malfermis la torakon, fine liberigante la buŝon de la birdo, ĉar ili volis aŭdi ties voĉon. Tiu voĉo, tiu ĝisosta, inkuba voĉo superis ĉion imageblan, sed ĝuste tial necesis urĝi la aferon, la ekzekuton kaj la enfoson, ĉar estis timeble, ke iu en la domo aŭdos la voĉon. Entute ili kontentegis, la afero valoris la penon.

Posttagmeze la pli aĝa filo foriris sola el la hejmo. En iu domo li malkovris ion. Tra la fenestro li vidis en ĉambro duone nudan knabinon, kiu kombis sin en rozkolora ĉemizo. Li revenis de la stratangulo, kaj refoje enrigardis la ĉambron. Ŝi staris nun dorse al li, fone de la ĉambro, ŝiaj blankaj ŝultroj preskaŭ brilis en la sunlumo. Li eniris tra la dompordo. Maljunulino venis al li, sed samtempe, fine de flanka koridoro, aperis la juna knabino. Li aliris al ŝi kaj diris, ke li volis vidi ŝin de pli proksime, ĉar ŝi tre plaĉas al li. Ŝi tuŝete ekkaresis la puran vizaĝon de la svelta, kulota knabo, kiu salte ĉirkaŭbrakis al ŝi la kolon, kaj gluis siajn lipojn al ŝia vizaĝo. Dume pordoj malfermiĝetis ĉirkaŭe, kaj elrigardis junaj, knabinaj kapoj; baldaŭ la kapoj senbrue retiriĝis. Fine de la koridoro lumis meĉo kun blua vitro; tien ŝi kondukis la pli aĝan filon de Witman. Ili mallevis la kurtenon, la posttegmeza sunlumo filtriĝis flave en la parfuman ĉambron. Ŝi ruliĝis sur la tapiŝon, lasante sin senmove kisi, brakumi. La filo de Witman memoris la strigon, kaj trafulmis lin la penso, kial ĉio, kio belas, grandiozas kaj ekscitas en la vivo, estas samtempe neklarigebla kaj sanga? Baldaŭ tamen ektedis lin la ludo. Senreviĝinte, li leviĝis, atendis, kaj rigardis la virinon per larĝe malfermitaj okuloj. Post nelonge li adiaŭis, sed promesis veni novan fojon. Li demandis ŝian nomon — Irén ŝi nomiĝis —, li trovis la nomon tre bela, kaj fine diris:

— Mankison. Ĝis revido.

Tiutage la du Witman-filoj migradis tra kampoj ĝis malfrua vespero. Pri la okazintaĵoj ne temis. La pli aĝa rakontis, ke en la aero vivas estaĵoj, homojn similantaj, kaj se blovetas brizo, senteblas, kiel naĝas ilia korpo en la aero. Poste ili haltis, fermis la okulojn, kaj disetendis la brakojn. La pli aĝa filo asertis, ke grandegaj, molkorpaj aer-virinoj ĉirakaŭŝvebas lin, dorse kaj mame tuŝante lian vizaĝon. Post kelkaj minutoj la frato raportis, ke ankaŭ li sentas la virinojn. Hejme, enlite ili plu parolis pri la virinoj de l' etero, kaj lasis la fenestrojn malfermitaj, por ke ili povu enveni. Ili envenis. Sen ia bruo ili englisis, apenaŭ tuŝis la vitron de l' fenestro per sia velura dorso, kaj flose, naĝe ili etendiĝis apud la knabojn sur la peplomon, sur la kusenon. Ili alklinis sian kolon al la buŝo, al la vangoj de l' knaboj, kaj pluglitis per langvoraj, pigraj, tamen facilaj movoj. La tutan nokton ili restis en la ĉambro de l' knaboj. Kliniĝante, ili kunplektiĝis, flosis ridetante al la fenestro, rampis reen al ili, surkuŝis kaj korpalkorpis ilin. Nur kiam la tago enrampis la ĉambron per brilaj; varmaj radioj, tiam ili foriris tra la fenestro, per lanta, reva, stumblema flugo, kaj dissolviĝis en la freŝa aero de l' mateno.

Tiun tagon la du Witman-filoj kune iris al la knabino. En varma, maja tagmezo ili devojis tien, venante el la lernejo, kaj enŝteliĝis tra la dompordo. Ŝi venis al ili ridetante, hirta, sed kun freŝa, laŭta rido, kaj enkondukis la filojn Witman en sian ĉambron. Ili demetis la librojn, kaŭriĝis sur la tapiŝo, altiris la knabinon, kisis, mordis kaj brakumis ŝin. Ŝi ridis fermante la buŝon kaj la okulojn. La okulbrilo de l' knaboj kunkroĉiĝis. Ambaŭ komencis bati ŝin. Ŝi ridegis jam plenbuŝe, kvazaŭ tiklita. La du Witman-knaboj ekposedis, pinĉadis, terenpremis, ruladis kaj turmentis ŝin. Ŝi lasis sen movo, anhelante, ke ili faru kun ŝi laŭ sia volo. Ruĝavange ili premiĝis al ŝia rozkolora, silka negliĝo. Poste ili kolektis la librojn, diris al ŝi, ke ŝi estas la plej bela inter ĉiuj virinoj, kiujn ili vidis. Irén respondis, ke ŝi amas ilin, sed sekvafoje ili alportu ion, dolĉaĵon aŭ floron. La pli granda Witman deklaris, ke ŝi estos kontenta pri tio, kion ili alportos. Ŝi akompanis la knabetojn ĝis la dompordo, kaj kisis al ili la manojn.

Post la tagmanĝo ili enfermiĝis en sian ĉambron, kaj parolis pri la knabino; ili konsentis, ke ĉi tiu sperto nekompareble superas ĉiujn ĝistiamajn aventurojn, eĉ la turmentadon de l' strigo.

— Nur por tio indas vivi — diris la malpli aĝa.

— Jen kion ni serĉis per tiom da penoj — deklaris la alia.

En brilege varma maja posttagmezo, sen libroj ili ekvojis al la lernejo. Sed ili iris rekte antaŭ la domon, al ŝia fenestro. Neniu videblis. Ili returnis sin: ĉ duan fojon jam ekmoviĝetis la kurteno, kaj elrigardis la knabino. Ili haltis. Ŝi malfermis la fenestron.

— Ĉu vi venos morgaŭ tagmeze? — ŝi demandis ridetante. — Venu tiam, alportu ion. — Ŝi mansignis kaj fermis la fenestron.

Ili ruĝiĝis je ŝia vido, ekbategis ilia koro.

— Juvelojn ni alportos, oran braceleton aŭ ringojn — deklaris post longa silento la pli aĝa Witman-filo.

— Jes, sed kie vi prenos tion?

— Panjo havas, ni petos de ŝi.

— Ŝi ne donos.

— Ni ekhavos la ŝlosilon de la vitra ŝranko.

— Ŝi ne ellasas ŝlosilojn el la manoj.

— Kvankam ŝi havas kvar orajn braceletojn kaj sep ringojn.

— Ankaŭ sur la fingroj ŝi portas tri riñgojn.

Vespere ili ŝtele ĉirkaŭadis la ŝrankon, inspektis la trezorojn de la patrino. Estis inter ili du braceletoj, inkrustitaj per superbaj rubenoj kaj perloj.

Ili petis s-inon Witman, ke ŝi montru la aĵojn al ili. Ŝi — la obstina, mola blondulino — elpelis ilin. Ŝi iom timis siajn filojn, ŝi sentis ilin malproksimege de si.

La knaboj kuris surstraten por konsiliĝi.

— Ne eblas peti de ŝi.

— Kun nenia preteksto.

— Ŝi ne donos.

— Ne, ne.

— Necesus enrompi la ŝrankon.

— Ŝi vekiĝos, kriados, same ni ne povos forporti la aĵojn.

— Ŝi ne vekiĝos!

Ilia koro plenis je malamo al sia blonda, bluokula, pigra kaj dika patrino, ili havis emon turmenti ankaŭ ŝin.

— Mi enrompos unu el la vitraj septoj per la tenilo de mia trancilo, kaj ne estos plua bruo. Vi lumigos per la lanterno, mi enigos la manon kaj elprenos ĉiujn braceletojn kaj ringojn.

— Ni ne prenu ĉiujn!

— Jes, ni prenos ĉiujn; ŝi ne bezonas tion, por ŝi nenio restu, ŝi nur ploraĉu pro ili.

Ili suprenkuris al la subtegmento por inspekti la instrumentaron, kunprenis ĉizilon, tenajlon, ekzamenis la lampon kaj ĉion enpoŝigis. Poste ili hastis malsupren kaj enlitiĝis. Antaŭe ili tamen trarigardis la subpordan fendon kaj vidis, ke en la patrina ĉambro jam mallumas. Dum la senvestiĝo ili decidis iri tien nur ĉirkaŭ noktomezo. La ŝtrumpojn ili ne demetis, por ke la planko ne kraketu, kaj tiel ili enlitiĝis, vigile, sed trankvile. Surkubute en la litoj, ili flustre planadis, kiel tagmeze, post la studhoroj, ili kuros al la knabino. La trezorojn ili enfosos sub la tegmento kaj forportados poiome. Ili ĝojis je la penso, ke ŝi koleros, ploros senpove, se ŝi ne trovos la juvelojn. Eĉ por momento ne plu temis pri la eventualo, ke ŝi eble vekiĝos. Poste ili leviĝis ellite, malfermis la fenestron kaj elkliniĝis en la varmetan majan nokton. La hundobojoj, la klakado de ĉaroj, kiuj periodigis la nokton per sia intermita eksono, ne mallongigis la lantan pason de la horoj.

Kiam la tura horloĝo fine, malrapide batis noktomezon, ili ekpretigis sin. Ili lumigis la lampeton, la malpli aĝa Witman-filo alprenis la tenajlon, la fajlilon kaj la lanteron, la alia nur sian grandaklingan, malfermitan poŝtrancilon. Li iris la unua. Kun sinfida trankvilo ili ŝteliris tra la meza manĝoĉambro, poste la pli aĝa filo antaŭeniris kaj malfermis la pordon al la dormoĉambro de s-ino Witman. La pordhoko tute ne grincis. Ili ekspiris. S-ino Witman dormis trankvile, fronte al la vando, videblis de ŝi nur la dika, larĝa dorso, kiun kovris trikita robo. Ili lokis sin antaŭ la ŝranko.

La knabo levis la trancilon por enbati la vitran septon de la ŝranko. Kelkajn sekundojn li hezitis, poste ekfrapis la vitron. La tintego grandis, terure fortis, tiel fortis, kvazaŭ kesto da vitraj glasoj estus ĵetitaj el fenestro de pluretaĝa domo. S-ino Witman turnis sin, poste, jam surkubute, malfermis la okulojn. Ŝia mieno esprimis ĉagrenon kaj obstinan koleron, sed ekparoli ŝi ne povis, ĉar la pli aĝa Witman-filo alsaltis la liton kaj ŝovis la trancilon en ŝian bruston. Ŝi retrokliniĝis kaj la dekstran manon ŝi svingis en la aero. La malpli granda jam surlitis kaj detenis al ŝi la piedojn. La alia eltiris la sangan trancilon el la patrina brusto kaj pikis refoje. Ne necesis, ĉar ŝi estis jam morta. El ŝia brusto la sango elfluis lante sub la peplomo.

— Nu, en ordo — diris la pli aĝa —, nun ni elprenu la aĵojn.

Ili elŝrankigis la juvelojn, la braceletojn, la broĉojn, ringojn, la horloĝon kaj ties longan, oran ĉenon. Ili trankvile dismetis sur la tablo la trezorojn akiritajn, konkeritajn, disklasis kaj konsente dividis ilin.

— Nun rapide, ni lavos kaj alivestos nin.

Ili iris en la propran ĉambron, lavis la manojn, elverŝis la akvon, sed alvestiĝi ne necesis, la sango nenie markis ilian veston.

Poste ili reiris al la loko de la faro. La malpli aĝa Witman-filo malfermis la fenestron de la meza ĉambro kaj tie atendis la fraton, kiu ŝlosis la ĉambron de s-ino Witman deinterne kaj, paŝante de la fenestro sur la kornicon, envenis tra la malfermita fenestro.

La strato fulge mallumis, regis morta silento, sed necesis rapidi, ĉar la turhorloĝo batis la unuan, kaj ili volis ankoraŭ dormi. Ili senvestiĝis, enlitiĝis kaj post kelkaj sekundoj, mortlacaj pro l' ekscito, ambaŭ jam profunde dormis.

Matene vekis ilin la purigistino, kiu alvenis ĉiam precize je la sesa kaj duono. Ŝi jam kutimiĝis al tio, ke s-ino Witman leviĝas je la deka, kaj tial ŝi ne eniris ŝian ĉambron. Post la purigo de la manĝoĉambro ŝi ordinare vekis la knabojn, kiuj tuje lavis sin, matenmanĝis kaj malaperis kun la trezoroj enpoŝe.

— Antaŭ la studhoroj!

— Bone!

— Ni devas precize ĉeesti la instruhoron.

— Nepre, precipe hodiaŭ.

— Je la dekunua oni ĉiel vokos nin hejmen.

— Ni rapidu.

La dompordo estis malfermita. Ĝis ili alvenis la pordon de l' knabino sur la koridoro, ili renkontis neniun. Ili malfermis ĝin. Ŝi dormis kun ruĝaj vangoj, profunde, ili senkovriligis kaj ekkisis ŝin, poste ili elpoŝigis la trezorojn. Ĉion ili dismetis sur ŝiaj ventro, mamoj, femuroj.

— Jen, tion ni alportis.

— Ĉio ĉi estas via.

Ŝi rekonsciiĝis malfacile, sed ridetante, ŝi albrakumis la duran kranieton de la du krimuloj, dankis pro la vizito kaj turnis sin al la muro.

— Ni venos hodiaŭ aŭ morgaŭ.

Tiam la knaboj adiaŭis kaj ekrapidis al la lernejo.

El la hungara: István *Ertl*

Szilárd Bálint

§ Ĉu ĵaluzo estas puninda ago?

La flugmaŝino glate flugis sur la blua ĉielo, preter ĝi blankaj cirusnuboj flosis. La stevardino sur pletoj proponis la intermanĝetojn, rostitajn kokidaĵojn, fruktojn kaj blankan vinon, krome refreŝigajn trinkaĵojn. Ĉe unu fenestro sidis bela nigrahara fraŭlino, apud ŝi juna viro, kiu volonte transdonis la elektitan delikataĵon al la fraŭlino.

Elza dankis la komplezon. Gustumante torton ŝi elrigardis tra la ronda fenestro. Supre estis luma brilo, malsupre kiel lanuga peplomo estis videblaj jam grizblankaj kumulusoj. Inter la nuboj kelkloke truoj ebligis trarigardon al la bruna tero kaj al la fora malhelverda oceano. Proksimiĝis la alteriĝo, la turistgvidanto laŭte alvokis por prepariĝi.

Elza kaj Géza en la flugmaŝino, post la konatiĝo jam decidis, ke ili petos proksiman loĝejon. Tial en la sama domo ili ricevis lokon ĉe bulgara familio, kiu pere de la vojaĝoficejo akceptis gastojn. En unu ĉambro loĝis kvar virinoj, en la alia kvar viroj. Por manĝi ili iris al proksima restoracio.

En la urbo Varna ilin ne atendis fiksita programo. Elza kaj Géza preskaŭ ĉiam kunestis. El la indigoblua ĉielo la sundisko arde dispersis varmigajn radiojn, eĉ en la ombro oni mezuris 40 gradojn da varmo. Kiel disruliĝintaj papavsemoj milope baniĝis la homoj en la malhelblua maro. Blankaj ŝaŭmoj galopis sur la dorso de la ondoj, kiuj kvazaŭ pajlojn tiris al la bordo la baniĝantojn.

Ĉie svarmis eksterlandanoj. Granda parto de la hungara grupo jam dum la unua tago brulvundiĝis pro la suno. Ili ventrokuŝante ĝemis dum la tuta nokto. Kun la turistgvidanto la grupo vizitis la oran sablon. Preskaŭ ĉiu fotigis sin sur la kameloj aŭ sur la azenoj. La dusemajna feliĉa ferio rapide pasis, oni devis hejmenflugi. La du gejunuloj dum tiu senzorga tempo ekamis unu la alian. En Budapeŝto post nelonga tempo ili iĝis gefianĉoj. Iliaj gepatroj ne oponis la geedzecon, kvankam jam dum la ferio en Bulgario Géza montriĝis tre ĵaluza pri Elza. Se iu viro pli longe rigardis ŝin, Géza tuj atentigis ŝin pri la sindeteno.

La du gejunuloj ĉiutage renkontiĝis. Matene Géza akompanis ŝin al la kontoro, kie ŝi estis librotenisto, kaj postagmeze li atendis Elzan antaŭ la oficejo. Preskaŭ ĉiuvespere Géza restadis ĉe sia fianĉino kaj gardis ĉiujn ŝiajn movojn. Eĉ en la kinejo anstataŭ la filmo li plej ofte rigardis la konduton de sia fianĉino.

La patro de Elza atentis pri la nekutima konduto de Géza, kaj li avertis sian filinon, ke la ĵaluzo estas danĝera malsano.

— Kara patro... oni diras, kiam malpliiĝos la flamanta amo... tiam malaperos la ĵaluzo — respondis Elza.

Foje iu amiko de Géza por ĉikani lin diris, ke al Elza iu amindumas. Géza iĝis maltrankvila, eĉ, dirante, se tio estas vera, tiam li saltos en la riveron Danubo. Lia patrino persvadis lin iri al kuracisto, kiu preskribis trankviligilojn, sed la medikamentoj ne mildigis la agacon.

La gepatroj de Elza petis la filinon interrompi la kontakton kun Géza, ĉar verŝajne malbone finiĝos tiu afero. Kvankam la gepatroj de Géza ankaŭ konsentis kun la timo de la fianĉina familio, tamen Elza restis nefleksebla dirante, ke la vera amo venkas ĉiun obstaklon.

Antaŭ la jarfino Géza estis invitita dimanĉe tagmanĝi ĉe la fianĉina familio. Li jam matene forlasis la gepatran domon kaj dumvoje eniris en etan drinkejon. Tie li renkontis kolegojn, kiuj estis jam en bona humoro. Ili trinkis brandon kaj bieron. Géza malofte drinkis, tial pli forte efikis la alkoholo. Li iĝis ebria. Liaj amikoj komencis ĉikani lin asertante, ke iu Andor, ofte serĉas Elzan, kaj tiam ili longe parolas per telefono.

Kiam Elza konstatis la staton de Géza, ŝi proponis al li ripozi iom en lito. Sed Géza ne estis inklina je tio kaj postulis, ke Elza tuj konfesu, kian kontakton ŝi tenas kun Andor. Elza neadis ĉian ajn kontakton kun Andor. Géza postulis, ke ili kune iru al la loĝejo de Andor. Kun la patro de Elza ili triope ekiris.

Ĉe la loĝejo de Andor, lia patrino akceptis ilin, kaj diris, ke ŝia filo ne estas hejme, li vizitas alian familion sube en la teretaĝo. Ĉi tie la dommastrino aperis ĉe la pordo, malantaŭ ŝi scivolemis blonda fraŭlino. Géza diris, ke ili volas paroli kun Andor. Tiu ĉi tuj venis al la koridoro antaŭ la pordon. Géza metis la demandon:

— Kial vi ĝenas mian fianĉinon?

— Mi tute ne ĝenas ŝin... mi serioze amindumas tiun ĉi fraŭlinon — li respondis montrante al la blondulino.

Andor vidis, ke Géza estas ebria, kaj li sentis la strecitan situacion. Li ekprenis la klinkon por reiri en la loĝejon. Tiam Géza paŝis proksime al Andor kaj ekprenis lian mentonon.

— Kion vi faras, amiko? Ĉu vi volas interlukti kun mi? — demandis Andor kaj volis retropaŝi.

En tiu momento Géza laŭte ekkriis, kaj per poŝtranĉilo fulmorapide pikis en la ventron de Andor, kiu ŝanceliĝis en la antaŭĉambron. La loĝantoj tuj vokis la ambulancon kaj la policon. La vivon de Andor, feliĉe, savis la kuracistoj.

Dum la tribunala proceso la juĝisto demandis de Elza:

— Post tiu tragika evento, ĉu vi volas daŭrigi la fianĉinan kontakton?

Jes... ĉiam... ĉar tiu, kiu kapablas lukti por mi... tiu vere amas min...

Post la priaŭskultado de la atestantoj la tribunalo interkonsiliĝis. Inter la juĝisto kaj la asesoroj komenciĝis granda diskuto. Unu diris, ke laŭ la psikiatro la akuzato ne estas cerbomalsana, sed impulsiĝema psikoneŭroza persono kaj la abrupta afekcio akcelis la eventon. Ĉar la ago ne ŝajnas intenca, kaj la akuzato estas ĝis nun nepunita, li proponis absolvi lin. Laŭ la alia asesoro ne eblas ĉion imputi al la afekcio, kaj la ebrieco estas ŝarĝiga cirkonstanco. La unua asesoro menciis, ke la fianĉino konsideras porindulga motivo la mensogojn de la kolegoj, kiuj erarigis lin. Fine la tribunalo interkonsentis kaj la juĝisto anoncis la verdikton.

* * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas la tekston de la verdikto, tial ni petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion kaj la teksto (ĉirkaŭ 30 linioj) aperos en Hungara Vivo. Limdato: du monatoj post la apero de la historio.

DAŬRIGO

de la novelo
ADA KAJ IDA
aperinta en la n-ro 1986/3.
Daŭrigas:
Boris Glozman, Zaporoĵje, SU.

Kiam la sekvan tagon venis en la kafejon la tiutaga Adaida — kiu estis Ada — la kafejisto akceptis ŝin eĉ pli afable ol iam. Sed tute vane li serĉis sur la vizaĝo de la virino la tre sopiratan respondon, Ada silentis, kvazaŭ ŝi mutiĝis, kaj ŝia rideto ŝajnis mistera por la mastro. Nur antaŭ la vespera fermo de la kafejo li prenis kuraĝon kaj demandis ŝin heziteme, ĉu ŝi havas ion por diri al li?

Ada provis preteriri la demandon, ŝi metis la manĝilaron jen tien, jen aliloken pretekstante laboron. Fine tamen ŝi balbutis ion, kiu havis la sencon de nenio. Elirante ŝi abrupte donis kison al li. La mastro iom miris, ĉar hieraŭ la kiso ŝajnis iom alispeca... kaj ricevita nun maldekstre...

Venis la morgaŭo, jen venis Ida, ridetanta kaj afabla. Kun pli da kuraĝo, la mastro rekte demandis ŝin pri la decido. Kaj nun tute alimaniere ol hieraŭ, li ricevis veran respondon: — Dimanĉe vi aŭdos mian decidon, bonvolu atendi ĝin! — kaj ŝi donis kison... dekstre.

Venis ankaŭ tiu tago, kaj la mastro devis mirigite fiksi siajn okulojn al la du virinoj, kiuj aperis same vestitaj, spegulantaj unu la alian antaŭ li. La ĝemeloj alridetis lin, sed li povis nenian vorton eligi, nur staris antaŭ ili en ega surprizo.

Sed la virina lango ekmoviĝas pli rapide. Komencis Ida: „Ni ambaŭ estimas vin, kara mastro! Ni vere volonte sentis kaj la juĝisto anoncis la verdikton.

* * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas la tekston de la verdikto, tial ni petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion kaj la teksto (ĉirkaŭ 30 linioj) aperos en Hungara Vivo. Limdato: du monatoj post la apero de la historio.

DAŬRIGO

de la novelo
ADA KAJ IDA
aperinta en la n-ro 1986/3.
Daŭrigas:
Boris Glozman, Zaporoĵje, SU.

Kiam la sekvan tagon venis en la kafejon la tiutaga Adaida — kiu estis Ada — la kafejisto akceptis ŝin eĉ pli afable ol iam. Sed tute vane li serĉis sur la vizaĝo de la virino la tre sopiratan respondon, Ada silentis, kvazaŭ ŝi mutiĝis, kaj ŝia rideto ŝajnis mistera por la mastro. Nur antaŭ la vespera fermo de la kafejo li prenis kuraĝon kaj demandis ŝin heziteme, ĉu ŝi havas ion por diri al li?

Ada provis preteriri la demandon, ŝi metis la manĝilaron jen tien, jen aliloken pretekstante laboron. Fine tamen ŝi balbutis ion, kiu havis la sencon de nenio. Elirante ŝi abrupte donis kison al li. La mastro iom miris, ĉar hieraŭ la kiso ŝajnis iom alispeca... kaj ricevita nun maldekstre...

Venis la morgaŭo, jen venis Ida, ridetanta kaj afabla. Kun pli da kuraĝo, la mastro rekte demandis ŝin pri la decido. Kaj nun tute alimaniere ol hieraŭ, li ricevis veran respondon: — Dimanĉe vi aŭdos mian decidon, bonvolu atendi ĝin! — kaj ŝi donis kison... dekstre.

Venis ankaŭ tiu tago, kaj la mastro devis mirigite fiksi siajn okulojn al la du virinoj, kiuj aperis same vestitaj, spegulantaj unu la alian antaŭ li. La ĝemeloj alridetis lin, sed li povis nenian vorton eligi, nur staris antaŭ ili en ega surprizo.

Sed la virina lango ekmoviĝas pli rapide. Komencis Ida: „Ni ambaŭ estimas vin, kara mastro! Ni vere volonte edziniĝus." Interrompis Ada: „Sed vi havas jam pli ol kvindek jarojn. Kaj ni nur ties duonon, sinjor[illegible]!"

Rekomencis denove Ida: „Sed neniam ni emas disiĝi, komprenu! Ni estas du, kaj vi estas nur unu..." Kaj ree Ada daŭrigis: „Ho, se vi havus fraton..."

La vorton reprenis Ida: „Ni scias bone, ke vi serĉas ne sole edzinon!" „Jes — frapis la voĉo de Ada — ankaŭ servistinon por la kafejo, ĉu ne?"

„Ni estos denove gazetkolportistoj — daŭrigis Ida — kaj ni havos abunde da tempo por nia ĝardeno." Gaje aldoniĝis la vortoj de Ada: „Krome tempon por trovi fratojn por ni... eble eĉ ĝemelojn, kial ne? Sed nun ni forlasos vin kaj vian kafejon!"

Adiaŭ! — sonis el la virinaj buŝoj, kaj la mastro ricevis por la fino po unu kison: de Ida dekstre... de Ada maldekstre.

Jevgenij Vinokurov

MI VIZITIS DENOVE...

Mi vizitis denove tiun urbon,
kie amis mi el plena koro.
En okuloj miaj grandan kulpon
havis ŝi, sed gardis ŝin memoro.

Jen ŝia domo. Rakonto detala
pri la mort' aŭtune okazinta.
Ŝi mensogema estis, ankaŭ kara,
malbonema kaj tamen aminda.

Tasko komplika. Ne solviĝos far mi.
Sortsekretojn mi plu ne esploras.
Nenion mi scias, povas nur larmi,
sen kompreno. Nur ŝin mi priploras.

MUTA FILMO

Kiel la fiŝoj, la buŝon malfermas
Aktoroj kurantaj. La filmo haltas
Pro bendrompiĝo, paŭzoj alternas.
Oni la lampojn plurfoje enŝaltas.

Triumf' de gestoj. Jen, filmo sen vorto.
Tragika krio freneza kaj akra.
Sen voĉ'. Rabo de fianĉin' per forto.
Vualo koten, rifuĝo fiakra.

Vort' superflua. Nuba, kiel bendoj.
Min silentigas iu ŝok-efiko...
Silento regas en profundaj sentoj.
Sufero muta. Sensona muziko.

El la rusa tradukis: Márton Fejes

PANORAMO

Laboristaj kunvenoj

La pasinta jaro ne estis aparte sukcesa por la hungara ekonomio, tial montriĝis necese enkonduki signifajn ŝanĝojn sur la kampo de la ekonomia direktado. Dum januaro okazis en nia lando multaj laboristaj kunvenoj, en kiuj la gvidantoj de la partio kaj registaro informis la laboristojn pri la nova situacio kaj pri la postuloj de la novaj cirkonstancoj. Sur nia foto: Lénárt Pál, sekretario de la CK de la Hungara Socialisma laborista Partio parolas en Budapeŝta laborista kunveno.

Packonferenco en Budapeŝto

Fine de januaro okazis en Budapeŝto la 11a Hungara Packonfeenco, kiu estas la plej supera organo de la hungara pacmovado. Estis elektita nova Nacia Konsilio de Paco, en kiu, same kiel ĝis nun, du personoj reprezentas la Esperanto-movadon: d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM kaj Sándor Jakab.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Eksterordinara vintro

Eksterordinare vintro vizitis en januaro Hungarion: okazis nekutime grandaj frostoj — ĝis minus 30 gradoj — kaj falis enorma kvanto da nego. La rigora vetero kaŭzis signifajn damagojn en la ekonomio kaj ankaŭ en la ĉiutaga vivo, precipe koncerne la transportadon de personoj kaj varoj.



Mesaĝo al la estonto

La 3an de januaro en la Budapeŝta Urba Parko oni enfosis en la teron metalan keston, kiu enhavas la mesaĝojn de la nuntempaj gejunuloj por tiuj, kiuj vivos post kvindek jaroj: la kesto enhavas objektojn karakterizajn por la nuntempa vivo, kaj laŭplane estos elfosita la 3a de januaro 2037. Sur nia foto: la antaŭpreparado de la objektoj.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO +

ALBATOURS

„TIE, KIE IAM ONI KRONIS REĜOJN, NUN REĜAS LA GASTOJ"

SZÉKESFEHÉRVÁR — en la mezepoko ĝi nomiĝis ALBA REGIA, troviĝas en ĝi la majestaj konstruaĵoj de la pli ol miljara urbo, kie oni kronis la hungarajn reĝojn...

LAGO VELENCEI — kun silke karesa varmeta akvo,
— naturprotekta teritorio „MADÁRVÁRTA" (birdozezervejo)

GORSIUM (HERCULIA) — ruinoj de dumil jara Romia urbo...

MARTONVÁSÁR — centro de la Hungarlanda Beethoven-kulto

OFERTAS AL VI AGRABLAN RIPOZON KAJ GRANDIOZAJN TRAVIVAĴOJN

dum ajna periodo de la jaro en la aranĝoj de

ESPERANTO-SERVO DE ALBATOURS

Bonetosaj hoteloj, sunbrilaj kampadejoj, specialaj programoj

ALBATOURS
Fejér Megyei Idegenforgalmi Hivatal
(Turisma Oficejo de Departemento Fejér)
H-8000 Székesfehérvár,
Szabadság tér 6.

Telefono: 12-494
Telekso: 21-235

REVUO DE REVUOJ

Aperis io tute nova, io tre dezirinda inter niaj revuoj: FOKUSO. Posteulo de la „Internacia Komputado", la kovrilpaĝo kolorbilde aludas al la plej moderna tekniko, al la strange eta mikroelektroniko. Incitite, mi kun granda intereso legis — indas ja ekscii ankaŭ tion, finfine! — la ilustritan historion de la mikrokomputiloj, la informojn pri ties kuriozaj fabrikmetodoj. Sed antaŭ ol formeti la dikan kajeron preskaŭ frapis la surprizo: ankaŭ la homaj sciencoj — ekonomiko, psikiatrio, edukado — prezentas sin en la temaro. La klopodoj kaj promesoj de la kuraĝaj — tamen ne aĝaj! — iamaj SEC-redaktoroj (ĉekape d-ro Péter Broczkó) por krei vere modernan kaj fake seriozan internacian magazinon de la humanaj kaj la natursciencoj, ŝajnas tre respektindaj ĝuste en la Jubilea Jaro. Laŭ la ĉi-jara unua numero (80 paĝoj) la celata diverseco de la sciencaj temoj kaj ilia lerta prezentmaniero taŭge interesigas ne nur la diversajn fakulojn, sed ajnan leĝanton. (FOKUSOn prezentas aparta artikolo en tiu ĉi numero!)

Dum la pasinta lernojaro tre impona nombro da bulgaroj lernis E-on: 3500 lernantoj de 250 lernejaj grupoj, kaj ĉ. 2 mil personoj en 160 aliaj kursoj. Ĉapelon levante ni devas entuziasme gratuli al tiu grandioza sukceso! Vigle do montriĝas la estonto de nia movado. Tamen la E-instruistoj kaj la direktantoj en la landa movado zorge diskutis por serĉi la rimedojn, per kiuj iĝos la E-instruado pli bona, pli efika — raportis sufiĉe detale BULGARA ESPERANTISTO (12.). Verŝajne tiu kaj similaj fenomenoj instigis la analizi ĉiam pretan Detlev Blanke mediti pri la utiligitaj cirkonstancoj kaj spertodonaj movadaj specifaĵoj en kelkaj socialismaj landoj. Laŭ lia kalkulo, en (nur) ses tiaj landoj en Eŭropo troveblas 37 mil organizitaj e-istoj, kaj tio prezentas jam certan amasecon, do firman bazon por esperdonaj prespektivoj. Tiun artikolon, aperintan en la n-ro 1986/6 de DER ESPERANTIST, ankaŭ HV transprenis, kaj ĝi legeblas ĝuste en tiu ĉi numero.

Oni devas demandi: ĉu tiuj perspektivoj implicas la plivastiĝon de la legi ŝatantoj, de la venontaj konsumantoj de nia literaturo?

Mi pensas, ke nea respondo estus tro malĝoja mem-minaco al nia „kolegaro", al nia popolo, kiu vivas dissemita tra la mondo. Bonŝance ni posedas grandiozan interkomunikilon, sed ĝi ekzistas kaj floras — do la E-kulturo — ene de la E-literauturo.

Laŭ mia opinio, tiu nediskutebla fakto reliefiĝis feliĉe en la novembra numero de ESPERANTO, kiu prezentis sin al la verŝajne plej granda E-publiko, kiel *literatura numero.* Multaj konatiĝis tiamaniere — grave! — kun nuntempaj specimenoj poeziaj kaj prozaj, eĉ se nur kun manplene kelkaj, kvazaŭ lumturaj ekbriloj el la „galaksio de brilegaj steloj", laŭ amaj kaj entuziasmaj vortoj de Marjorie Boulton. La rimarkinde pripensitaj opinioj de deko de niaj elstaraj literaturistoj donis mozaike ekscitan bildon de atendebla kometa evoluo literatura de la centjara lingvo.

Tiun kulturan estonton devas prepari i.a. JUNA AMIKO (3.) kiel bona amiko de la pli junaj legantoj (ankaŭ de ĉiuaĝaj komencantoj!), kiel amuzipova helpanto kaj kunludanto. La nova redaktoro, Stefan MacGill, ĉi-jare aperigos jam kvar numerojn, kaj — kiel mi konas lian inventeman humuron — certe kun tre variaj distraj-instruaj legaĵoj kaj ludaĵoj. Indas kunludi...

Bonŝance, mi trovis almenaŭ du citindajn kontribuaĵojn al mia prilingva alineo. Ke la Usona fakulo Doug *Portmann* donas detalan kontraŭnaturalisman kritikon en la lasta MEDICINA INTERNACIA REVUO (46.) pri la nova medicina E-terminaro, estas en si mem rimarkinda afero. Li ne ŝparas la multajn terminojn por pruvi, kiel preferinda estas vorto-formado el ekzistanta vort-materialo, anstataŭ pruntepreni — kiel facile! — el Eŭropaj lingvoj, kutime el la angla. Ke tiu sinteno komplikigas E-on, faras perturbojn, ne ĉiu terminologo volas rimarki. Rimarkinda artikolo!

Por esprimi sekson tute ne necesas sufikso (krom la esceptoj), deklaras tre racie kontribuanto en SEKSO KAJ EGALECO (13.) — verŝajne ŝi, kio tiurilate ja gravas. Do estas proponata la neglekto, eĉ bojkoto de la ina sufiko (jen, ankaŭ mi preteriris uzi ĝin) en la plej multaj okazoj. Atentu sole la „homon", prave. Aliflanke oni devas rekomendi al proponantoj de novaj seksaj gramatikaĵoj, komenci ties enkondukon en la propra nacia lingvo, se ĝi distingas ĉiupaŝe laŭsekse.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ottó Thur—Gyula Gyerkó

Nova rimedo en la amasa vinmanipulado

Hungario estas konata kiel grava produktanto de bongustaj vinoj. Pluraj ĝiaj vinspecoj akiris tra la mondo jam tradicie altan famon — sufiĉas aludi al la malnova prestiĝo de la vino de Tokaj. Tiu vitoregiono troviĝas nordoriente de Budapeŝto, kaj por nia legantaro indas mencii, ke inter ĝiaj ĉarmaj montetoj situas la vilaĝo Abaújszántó, naskiĝloko de Kálmán Kalocsay. La vizitintoj de lia memorĉambro jam multfoje gustumis en la vinkeloj de la tieaj samideanoj la vinojn, kiujn ili mem faris el la vinberoj de siaj vitoĝardenoj.

Ĉe ajna vinberaro havas elstaran gravecon por la kvalito de la vinspeco tiu procedo, fakte tuta vico da farendoj teknologiaj, kion ni nomu vinmanipulado. La privataj vitkultivistoj ĝenerale utiligas siajn proprajn spertojn, plejofte familie hereditajn dum la manipulado de siaj vinoj. Kompreneble la profesiaj vin-kelistoj de la vin-entreprenoj utiligas siavice la kolektitajn konojn de tiu branĉo, kiujn la sciencaj esploristoj kunigas kun la modernaj rezultoj de biologiaj kaj kemiaj eksperimentoj.

Inter la ne-malmultaj materialoj uzataj dum la vinmanipulado, eble la plej grava, jam tradicie utiligata estas eĉ nuntempe la sulfuro. Uzante ĝin oni povas ĉesigi la plimultiĝon de la sovaĝaj gistoj, t.e. nedezirataj fermentiloj, kaj grave preventi biologiajn malsanojn. Lige kun tio, eblas prokrasti aŭ haltigi la fermentadon de la mosto.

Kiam oni produktas ruĝan vinon, la sulfuro, aldonita al la vinberpremaĵo antaŭ la fermentado, forte kontribuas al la ekstraktiĝo de la koloro. Tiamaniere eblas produkti pli belan koloron de la ruĝa vino.

La sulfuro helpas al la vinmanipulanto, kiam li klopodas gardi la sukerenhavon de la dolĉaj vinoj. Malsanajn vinojn — se uzi la parolturnon de la vinistoj — kuraci oni devas uzi tre ofte sulfuran pulvoron laŭ diversaj metodoj.

Ankaŭ la entreprenoj ofte devas uzi la sulfuradon por la amasa vinmanipulado. Tiucele ili utiligas multspecajn aparatojn kaj ilojn, kiuj bedaŭrinde multe minacas kaj endanĝerigas la aplikantajn laboristojn. Tion kaŭzas plejofte la malcerta kapablo de tiuj aparatoj por precize, sekure kaj konvene dozadi la sulfuron aŭ la sulfurdioksid-gason. Nur malfacile kaj multekoste eblas disponi pri sulfuriloj, kiuj precize kaj sekure plenumas la dozadon.

La Apud-Danuba Regiona Entrepreno pri Akvoprovizo, en urbo Vác, klopodis solvi la suprajn problemojn kaj tiucele ĝi ekfabrikis modernajn produktaĵojn. Helpe de tiu serio dum la sulfurado de la vinoj foriĝas ĉiuj ankoraŭ eblaj malagrablaĵoj koncerne la teknologion, sanprotektadon kaj sekurecon de la laboristoj.

Temas pri la sulfur-dioksid-gas-dozigiloj de tipo Advance®, kiuj ebligas enigi la bezonatan sulfurdioksid-gason laŭ tre precizaj kvantoj. Aplikante tiujn aparatojn forestas la homan sanon minacantaj efikoj; la venenaj materialoj ne disŝprucas, nek enspireblas, kiel ofte okazas dum eligado de gasboteloj kaj dum aplikado de diversaj sulfurkombinaĵoj.

La dozadon de la sulfurdioksid-gaso teknike ebligas la estiĝanta vakuo en la nova aparato; sekve ĉiu ajn liko, disiĝo

1) Vakuregilo de la sulfurdioksidgas-dozilo ADVANCE 201/S



aŭ rompiĝo de la dozanta kondukilo tuj ĉesigas la fluon de la gaso. Tio signifas plenan laborsekurecon kaj por la ĉirkaŭaĵo, kaj por la manipulantaj laboristoj. Koncerne la manipuladon de la aparato eblas aserti, ke ĝi estas tre simpla; sekve ĉiu ajn laborulo de la entrepreno facile kapablas ellerni ĝin kaj labori per ĝi tute sekure. (Vd. fotojn 1-2.)

La sulfurdioksidgas-dozigiloj de tipo ADVANCE — samkiel ĉiuj aliaj gasdozigiloj de la sama tipo — laboras per la nuntempe plej moderna kaj plej sekura vakua metodo. Al tio strikte ligiĝas la vere altnivela teknika maniero rilate kaj la inĝenieran projekton, kaj la fabrikan teknologion.

Mem la aparato — en la tuta serio — esence konsistas el du ĉefaj partoj. Tiuj estas: la vakua regilo, aplikanta rotametron, kaj la enjektoro, enigita en la movanta vin-cirkvito. Vd. *Fig.1.*

Pro la likvofluado, resp. vinofluado en la enjektoro estiĝas vakuo, kiu tra la interliganta kondukilo kreas vakuon ankaŭ en la regilo. Pro la vakuo malfermiĝas la sekuriga valvo, kaj lasas ekflui la gason. La precizeco de la dozado estas malpli ol 4%. Se la likva aŭ vina fluado ĉesas, same se likas aŭ difektiĝas la vaku-kondukilo, la sekuriga valvo tuj fermiĝas, kaj plua gaselfluo ne eblas.

La kvanto de la dozita sulfurdioksidgaso estas observebla sur la rotametro, trovebla sur la antaŭplato de la vakuregilo. La bezonata kvanto estas fiksebla per mana regvalvo. Laŭdezire oni povas translokigi la rotametron kun sia regvalvo pli malproksime de la aparato — maksimume ĝis 150 metroj — kaj de tiu distanco teledirekti la aparaton.

Aparte grava avantaĝo de tiu nova aparataro estas, ke eblas pere de unu vakuregilo funkciigi samtempe plurajn enjektorojn kaj regi ilin en diversaj povozonoj. Aplikante plurajn enjektorojn kaj magnete regatajn valvojn ene de la

2) Sur botelo muntita sulfurdioksidgasdozilo kun enjektoro (Advance 201/S)



Vaku-regilo



Funkcia skemo de ADVANCE sulfurdioksidgas-dozigilo

Fig. 1.

Kapacitoj	Bazmodeloj	Teleregataj modeloj	Aŭtomate komutaj modeloj	Establa maniero
0,6 – 12 g/h 1,4 – 28 g/h 3,7 – 75 g/h 10,0 – 200 g/h 25,0 – 500 g/h 45,0 – 900 g/h 100,0 – 2000 g/h	201–S	281–S	205–S	Sur sulfur-dioksidgas-botelo
25,0 – 500 g/h 45,0 – 900 g/h 100,0 – 2000 g/h 200,0 – 4000 g/h	202–S	283–S	2025–S	Sur kolekta tubo

Fig. 2.

Fig. 3.

Dozata kvanto	Longo de la vakutuboj		
g/h	30 m	60 m	150 m
900	ϕ 3/8"	ϕ 3/8"	ϕ 1/2"
2000	ϕ 3/8"	ϕ 1/2"	ϕ 1/2"
4000	ϕ 1/2"	ϕ 5/8"	ϕ 3/4"

ENJEKTOR-karakterizoj



Fig. 4.

likva (vina) cirkvito, oni povas realigi plurŝtupan regadon pri la dozataj kvantoj.

Se la sulfurdioksid-gaso de la botelo elĉerpiĝas, tion indikas ruĝiĝo de la normale verda signalo sur la antaŭplato de la aparato. Laŭdezire eblas almunti tiuĉele ankaŭ elektran telesignalon. Se oni uzas botelŝanĝilon, la aparato aŭtomate alkomutas de la elĉerpita gasbotelo al la plena botelo.

La sulfurdioksidgas-dozigilojn de tipo ADVANCE la entrepreno fabrikas en ses variantoj, kaj ene de tiuj prezentiĝas vasta gamo de diversaj kapacitoj pere de konvenaj rotametroj kaj doz-reguligaj valvoj.

Se jam temas pri la variantoj de la fabrikaĵoj, estas menciinde aparte por interesiĝantoj pri teknikaj detaloj, ke ĉe la tipoj 201-S kaj 205-S la enira kuplilo de la enjektoroj estas hosa kuplilo de 1": la elira kuplilo por la solvaĵo estas ekstera ŝraŭbuma juntilo de 3/4" al universala difuzoro, aŭ hosa kupilo de 1". Ĉe la tipoj 202-S, 283-S kaj 2025-S la enira kuplilo havas eksteran ŝraŭbumon de 5/4", aliflanke la solvaĵon elkonduka kuplilo aliĝas kun hosa kupilo de 6/4".

Kio determinas la diametrojn de la vakutuboj, resp. kondukiloj, dependas ĉe tiuj aparatoj de la dozata kvanto kaj de la longo de la kondukiloj, laŭ la tabelo en *Fig.3.*

Se estas bezonata pli granda distanco, la dimensiojn de la necesaj vakutuboj devas determini la fabriko konsiderante la lokajn cirkonstancojn.

La funkciado de la enjektoro dependas de la moviganta likvocirkvito, prefere la vinocirkvito. La interrilatojn inter la premo en tiu likvo-, respektive vinocirkvito kaj la enjektora kapacito, oni povas legi sur la karakterizo-grafikaĵoj de la enjektoro, laŭ la *Fig.4.*

La entrepreno konsideris sia tasko disvolvi ankaŭ tian dozilon, kiun oni povas sufiĉe facile alproksimigi al la dise troviĝantaj vinbareloj kaj grandaj ujoj. Tio sukcesis, la entrepreno kreis la facile moveblan specialan ekipaĵon de tipo „Mobil-S", kiu funkcias per sulfurdioksidgas-dozilo ADVANCE. Por puŝi tiun specialan ekipaĵon oni apenaŭ bezonas grandan forton, eĉ se ĝi kunportas du plenajn gasbotelojn. (*Fotoj 3-5.*)

Tiu ekipaĵo aplikas pumpilon de tipo EcPO 40 (II-2)-24, kiu estas uzebla por kemiaĵoj. Tiu pumpilo plenumas la taskon trafluigi la manipulendan vinon en la enjektoro. Sur la ĉareto troviĝas ĉefkonektilo, krome komutilo, kiu ĉe ĉia ajn alkonektado kapablas igi ĝusta la rotaci-direkton de la pumpi-

3) Movebla sulfurdioksidgas-dozilo „MOBIL-S"





4) MOBIL-S ekipaĵo funkcianta ĉe subĉielaj vin-cisternoj

5) MOBIL-S ekipaĵo funkcianta ĉe vinkuvoj.



lo. Kompreneble la ĉareton — laŭdezire — la entrepreno volonte preparas ankaŭ por aliaj, jam funkciantaj pumpiloj.

La Mobil-S ekipaĵon ekuzis vinentreprenoj, kies keloj, respektive vinmanipulaj uzinoj amplekas relative vastan terenon. Montriĝis dum la funkciado, ke tiu ĉi ekipaĵo, aplikante la aparaton ADVANCE 201-S kaj unu gasbotelon, kapablas ĉiuhore dozadi 2000 g da sulfurdioksidgaso. Se al tiu ĉi ekipaĵo oni aplikas la aparaton ADVANCE 202-S kun du gasboteloj, ĝia dozada kapacito kreskas ĝis 4000 g ĉiuhore. Por konsideri pli bone, kiom grandaj estas la menciitaj dozadaj kapacitoj, sufiĉas, se ni menciias, ke dozante 2000 gramojn da sulfurdioksidgaso dum unu horo, oni manipulas almenaŭ 6-8 m^3 da vino samtempe.

La elektra kablo pro sia longo ebligas funkciadon ĝis distanco de 30 metroj, kio montriĝis tre praktika apud la vinbareloj. La gaskondukilo konektiĝas je 6/4", sed laŭdezire ĝi ricevas ankaŭ aliajn dimensiojn.

La sulfurdioksidgas-doziloj de tipo ADVANCE® estas fabrikataj surbaze de kunlabora kontrakto kun la Usona firmao Capital Controls Company. Kune kun la MOBIL-S aparatoj, kiuj ĉi-tie disvolvite signife vastigas ilian utiligeblon, produktiĝas jam la plej moderna, kompleta gamo de la utilegaj doziloj por la amasa vinmanipulado.

Volonte donas teknikajn informojn (kaj plenumas la priservadon de ĉiuj-ĉi doziloj): DMRV Industria Priserva Uzindirekcio, Budapeŝto, Dunasor 15, H-1044 (tel.: 690-704, telekso: 22-5121).

Eksportas: NIKEX, Budapeŝto, Mészáros u. 48-54. H-1016. (Tel.: 560-122, telekso: 22-4971).

Trad.: E. Fenyvesi

Julian Modest

TNA

Ŝajnis al Karov, ke la kelnerino iom suspekte alrigardis lin. Ĉu ŝi memoras lin? Kelkajn minutojn Karov ne rigardis al ŝi, kvazaŭ tute ne rimarkis ŝin, malgraŭ ke plurfoje ŝi pasis preter la tablo ĉe kiu li sidis.

Li provis daŭre, senmove fiksrigardi la vastan gobelinon sur la kontraŭa muro. Tiu ĉi gobelino ne donis al li trankvilon kaj febre li meditis pri la eventoj, kiuj okazis dum la lastaj kelkaj tagoj.

Ne. Li certas, ke li estas tute sana, sed la lasttagaj eventoj minacis skui lian sanon kaj prudenton. De matene ĝis vespere du demandoj boris lian cerbon:

„Kiu ŝi estis kaj de kie ŝi aperis?"

Li provis denove restarigi ĉion, kio okazis. Jes, estis en la komenco de oktobro, friska, suna tago, pli ĝuste posttagmezo, en la horo, kiam la homoj eliras el la oficejoj, kiam la centraj stratoj de la ĉefurbo bruas kaj viglas kiel gimnazianinoj.

Karov iom meditis. „Kiel gimnazianinoj" — bone sonis, sed ŝi estis studentino.

En tiu oktobra posttagmezo li hazarde eniris tiun ĉi kafejon kaj eksidis ĉe la sama tablo, ĉe kiu nun li sidas. Ankaŭ tiam la kafejo estis preskaŭ malplena, ĉar en ĝi oni ne permesis fumi.

La tablo, kontraŭ la granda gobelino, estis iom en la angulo, kaj de tie Karov povis bone vidi kaj la gobelinon, kaj la straton ekstere, sur kiu svarmis la homoj. Sur la alia flanko de la strato komenciĝis la urba parko, kaj de la kafejo klare videblis la altaj kaŝtanarboj, kies folioj iom post iom komencis flaviĝi.

Dum tiu fora oktobra posttagmezo ia agrabla trankvilo nesenteble obsedis Karov-on. Rigardante la unuajn signojn de la aŭtuno, li nevole meditis pri la aŭtuno, kiu silente enŝteliĝis ankaŭ en lian vivon. Post kelkaj jaroj li iĝos kvardekjara, kaj en tiu oktobra posttagmezo ŝajnis al li, ke ĉion eblan en la vivo li travivis...

— Ĉu la gobelino plaĉas al Vi? — la demando eksonis tiel subite, ke Karov ne povis eĉ reagi.

Eble jam dudek minutojn li strabis la gobelinon, sed fakte li tute ne rigardis ĝin.

Malrapide, surprizite Karov turnis sin kaj vidis, ke apud li, ĉe la tablo, sidas junulino, eble dudek kvin, dudek ses jara kun longa bruna hararo kaj okuloj, similaj al varmaj maronoj. Kiom da minutoj ŝi sidas apud li — li ne sciis, sed la demando eksonis tiel nature, kaj tiel amike ridetis ŝiaj maronaj okuloj, ke Karov nevole diris:

— Jes.

— Ankaŭ al mi ĝi plaĉas. Eble ĝin faris Mari Tileva — kompetente aldonis la junulino.

— Povas esti — murmuris Karov, malgraŭ ke li neniam aŭdis tiun ĉi nomon kaj tute ne interesis lin, kiu teksis la gobelinon. Tamen nun li atente trarigardis ĝin kaj konstatis, ke nenion li komprenas el ĝi.

La gobelino estis tiel vasta, ke ĝi kovris la tutan muron, kaj sur ĝi videblis iaj bluaj kvadratoj, ruĝaj strioj, oranĝa globo aŭ sfero, marverdaj figuroj, similaj al okuloj aŭ al konkoj.

— Ŝi estas tre talenta, ĉu ne? — denove ekparolis la junulino, sed nun kvazaŭ al si mem. — Ofte mi venas en la kafejon kaj mi ŝatas sidi ĉe tiu ĉi tablo, ĉar de ĉi tie plej bone videblas la gobelino.

— Ĉu — murmuris Karov kaj iom mire strabis la junulinon, sed ŝi eĉ ne rimarkis lian rigardon kaj daŭrigis voĉe mediti:

— Kiam mi observas la gobelinon, ŝajnas al mi, ke mi vidas la maron kaj en ĝi larĝan fiŝkaptistan reton. Kaj en tiu ĉi reto, kune kun sennombraj fiŝoj estas kaptita mem la suno. Tiu ĉi granda oranĝa suno.

— Interese... — diris Karov.

Sed por li pli interesa iĝis tiu ĉi nekonata junulino, kiu nerimarkeble sidis ĉe la tablo kaj tiel nature, trankvile alparolis lin, kvazaŭ ŝi konus lin jam de jaroj. Karov denove kaŝe, sed atente trarigardis ŝin. Ĉu ŝi ne apartenas al tiuj, kies ŝatokupo estas alparoli nekonatajn virojn? Ne. Tute ne. Ŝi estis tre modeste vestita, kun larĝa bruna jupo, kaj malgraŭ ke Karov ne interesiĝis pri la modo, la jupo ŝajnis al li iom malmoda. La bluzo, kiun surhavis la junulino, estis verda kaj ne tre konvenis al la bruna jupo. Tamen la malnova, merizkolora, jam sufiĉe elfrotita mansaketo, kiu kuŝis apud ŝi, montris, ke ŝi estas studentino aŭ juna oficistino, kiu ne havas sufiĉe da ebloj esti moda kaj eleganta.

Karov ne komprenis, ĉu ian kompaton li eksentis, sed subite li afable demandis ŝin:

— Kion Vi trinkos?

— Kaj Vi? — ekridetis la junulino.

Tiam Karov rimarkis, ke duonhoron li sidas en la kafejo kaj ankoraŭ nenion li mendis.

— Kafon — respondis Karov meĥanike.

— Same mi — aldonis la junulino.

Vesperiĝis kiam ili kune forlasis la kafejon.

— Mi loĝas proksime, ĉe la hotelo „Metropolo", kaj Vi? — demandis ŝi.

— Mi... apud la Centra Stacidomo, sed mi akompanus Vin... — proponis Karov hezite.

— Dankon — ŝi akceptis kaj ŝiaj varmaj maronaj okuloj petole ekridetis.

La multeteĝa domo, en kiu ŝi loĝis, troviĝis en la strato „Monto" 39, vidalvide al la hotelo „Metropolo".

— Ĉu iam mi vidus Vin denove? — demandis Karov pli pro afableco ol serioze, sed ŝi respondis tute aplombe:

— Kompreneble. Morgaŭ posttagmeze ni povus renkontiĝi en la sama kafejo.

Kompreneble Karov ne estis tiel naiva kaj ne kredis, ke ŝi diris tion serioze, sed la sekvan tagon posttagmeze, scivola kaj iom maltrankvila li eniris la kafejon.

Ŝi sidis ĉe la sama tablo kaj ŝajne atendis lin. Tion Karov ne kredis, sed kiam li proksimiĝis, ŝi tiel ekridetis kvazaŭ ŝi konus lin de jaroj.

Longe ŝi rakontis al li pri la universitato, pri la profesoroj, pri la ekzamenoj... Ŝi studis filologion kaj surprizite Karov konstatis, ke la profesoroj, kiuj iam lin instruis, ankoraŭ prelegas en la universitato, kaj ŝi same tiel bone konas ilin, kiel iam, antaŭ jaroj, Karov konis ilin.

Poste li eksciis, ke ŝia nomo estas Ina, ke ŝi ege ŝatas la literaturon, tamen ŝi tute ne deziras iĝi instruistino, sed tradukistino, ĉar ŝi perfekte regas francan lingvon.

Vesperiĝis, kiam ili kune eliris el la kafejo. Li denove akompanis ŝin ĝis ŝia domo. Survoje, trapasante la urban parkon, li kisis ŝin, kaj ŝajne ŝi atendis tion, ĉar ŝi ne kontraŭstaris. Mola kiel vato estis ŝia malsupra lipo, kaj dolĉa tremo longe kuris tra lia spino. Ĝis nun neniu virino kisis lin tiel ame kaj sindone kiel Ina.

Tiun nokton en lia obskura ĉambro la vekhorloĝo trankvile tiktakis, sed li vane provis fermi la okulojn kaj ekdormi. Apud li, sur la lito, kvazaŭ silente sidis Ina kaj li ne havis forton turni sian rigardon de ŝiaj varmaj maronaj okuloj.

„Kiam mi observas la gobelinon, ŝajnas al mi, ke mi vidas la maron kaj en ĝi larĝan fiŝkaptistan reton. Kaj en tiu ĉi reto kune kun sennombraj fiŝoj, estas kaptita mem la suno. Tiu ĉi granda oranĝa suno — flustris ŝi."

Ĉi flustro pli teneris eĉ ol la vento, kiu karesis ekstere la sekajn foliojn de la juglanda arbo.

La tagoj pasis kaj ĉiam agrabla varma ondo surveršis Karov-on, kiam li rememoris, ke preskaŭ ĉiun posttagmezon en la kafejo „Primavero" ŝi atendas lin. Malgraŭ ke la folioj de la arboj tute falis kaj la nigraj brancoj ostecis kiel rabofingroj, Karov jam ne rimarkis la aŭtunon. Li viglis, eĉ foje-foje emis kuri tra la stratoj kiel dekjara bubo.

— Morgaŭ ni iros en teatron — anoncis foje Ina en la kafejo.

— Bonege, kaj kion ni spektos? — li ekridetis, certa, ke ŝi ŝercas.

— „Makbeton" de Ŝekspiro — respondis Ina gravmiene.

— Ĉu?

— Vi venos preni min kaj ni iros kune. Ja la teatro najbaras al mia loĝejo.

— Jes, sed viaj gepatroj kiel reagos? — ekbalbutis Karov.

— Lasu tiujn antaŭjuĝojn — voĉe ŝi ridis kaj brue kisis lin en la kafejo.

Dum la tuta tago Karov hezitis kaj meditis, ĉu viziti la domon de Ina. Tamen spite al ĉio, ĝuste je la sesa kaj duono vespere, li sonorigis ĉe la pordo de ŝia loĝejo. Eliris Ina, ridanta kiel ĉiam kaj premante lian manon, trenis lin en la vastan, helan gastĉambron. Meze staris kaftablo kun kvar foteloj kaj ĉe la dekstra muro — libroŝranko, plenŝtopita per libroj.

En unu el la foteloj sidis virino, ne pli ol kvindek jara, kaj Karov tuj konjektis, ke ŝi estas la patrino de Ina. La patrino afable invitis Karov-on al la tablo, proponante al li fruktojn; vinberon, pirojn, pomojn, kiuj plenigis kristalan fruktujon en la mezo de la tablo.

— Estas nia produktaĵo — diris la patrino ne senfiere. — En la provinco ni havas fruktĝardenon.

— Ĉu? — murmuris Karov, rigardante ŝin streĉe.

„Kiel ŝi akceptas min? Ja, ŝi bone vidas, ke mi preskaŭ dek jarojn pli aĝas ol Ina. Nature ŝi ne estas tiel naiva kaj ŝi supozas, ke la rilatoj inter mi kaj Ina estas pli intimaj. Krom tio... Mi ankoraŭ ne diris al Ina, ke mi havis familion, edzinon kaj filinon... Sed Ina neniam demandis min pri mia nuna aŭ pasinta vivo. Mi devas jam rakonti ĉion al Ina..."

La pomoj vere bongustis. Manĝante Karov sentis, ke la patrino observas lin ridante milde. Li supozis, ke ŝi demandos lin pri lia profesio, pri lia edukiteco, sed la patrino silentis. Nur ŝiaj bluaj okuloj ridetis, kvazaŭ delonge ŝi bone konus lin, same kiel agas Ina.

Elirante el la loĝejo Karov pensis, ke tamen bone estis, ke li konatiĝis kun la patrino de Ina. La patrino jam scias kiel li aspektas kaj morgaŭ nepre ŝi malpermesos al Ina renkontiĝi kun li, ĉar Ina ankoraŭ studas kaj Karov estas matura, aĝa viro.

Male. La rendevuoj en la kafejo „Primavero" iĝis pli oftaj, la promenoj en la parko pli longaj kaj Karov jam ne sciis kiel agi. Por li, matura viro, la promenoj en la parko aspektis ridindaj. Li eĉ timis, ke foje iu kolego aŭ kolegino vidos lin kun Ina kaj poste li iĝos objekto de klaĉoj kaj primokoj. Sed por Ina ĉio estis natura kaj normala. Ŝi kisis lin ame ne nur en la parko, sed ankaŭ en la kafejo, kaj tute ne interesis ŝin ĉu proksime estas homoj aŭ ne.

Tiel pasis preskaŭ monato. De tempo al tempo Karov kalkulis kaŝe la tagojn ekde la fora oktobra posttagmezo kiam Ina neatendite kaj subite alparolis lin en la kafejo „Primavero". Iom time li iris al la kafejo, ĉar li supozis, ke iun posttagmezon li ne trovos Ina-n tie, sed ĉiam ĝuste je la kvina horo ŝi estis ĉe la sama tablo, en la angulo, vidalvide al la gobelino.

„Jam estas tempo rakonti al ŝi ĉion pri mia pasinta vivo kaj kuraĝe fini nian ligon" — meditis Karov, sed Ina parolis pri la universitato, pri libroj, pri filmoj kaj kiam li komencis ion rakonti, ŝi ŝajne enue kaj ne tre volonte aŭskultis lin.

En komenco de novembro Karov eksciis, ke li devas oficvojaĝi al Greklando. Viziti Atenon estis lia malnova revo, sed li nevole diris al si:

„Ĉu ĝuste nun, kiam tiel bone mi fartas kun Ina?"

Posttagmeze en la kafejo li provis indiferente diri al ŝi:

— Lunde mi veturos al Ateno.

— Ĉu? — la maronaj okuloj de Ina larĝe malfermiĝis.

— Mi devas partopreni en ia Balkana konferenco.

— Bonege! — entuziasme ekkriis Ina, kvazaŭ ne li, sed ŝi veturus al Ateno.

Ateno ravis Karov-on, sed en tiu granda urbo li ne tre bone fartis. Matene, dum la konferenco, li enuis, posttagmeze sencele li vagadis tra la stratoj kaj nekomprenebla melankolio obsedis lin. Ĉu melankolio? Stranga sento premis lian gorĝon. Silente li observis la homojn, nekonatajn, malproksimajn, kaj denove kaj denove li rememoris sian katastrofan vivon. La komenco ŝajnis bona; edziĝo, infano... Poste ĉio renversiĝis kaj sola bildo, kiel koŝmaro ripetiĝis dum tagoj kaj semajnoj.

Pluvis, kiam lia edzino prenis la infanon kaj brufrapis la pordon. Sur la strato atendis taksio. Ŝi kun la filino eniris ĝin rapide. De la balkono Karov aŭdis la krakon de la motoro kaj vidis etan manon, kiu adiaŭis lin lastan fojon. Eksilentis la domo. Dum tagoj la grundo sub liaj piedoj kvazaŭ iom balanciĝis. Sed nun en Ateno, sidante sola en la parko, antaŭ la Nacia Muzeo, ŝajnis al li, ke Ina aperis por iom ordigi lian kaosan vivon.

Karov plu ne demandis sin kiamaniere ŝi aperis kaj kiu ŝi estas? Gravis, ke en tiu ĉi minuto ie ŝi ekzistas. Li nepre devis aĉeti por Ina iun memorajon, kiun ŝi longe havu.

Tutan tagon Karov dediĉis al la elekto de tiu donaco. Ĝi ne devis esti tre granda, ĉar fakte li kaj Ina ankoraŭ ne tre bone konis unu la alian. Ĝi devis esti donaco amika, originala, alloga, kiu sugestus liajn sincerajn sentojn al ŝi.

Post longa hezito li elektis etan amforon, ornamitan per konataj scenoj el la antikva greka mitologio. Karov bone sciis, ke li ne tre kapablas elekti donacojn, sed nun ŝajnis al li, ke la elekto estas perfekta. Li eĉ vidis la ĝojan brilon en la varmaj maronaj okuloj de Ina.

Elflugante de Ateno Karov pensis pri Ina kaj pri la argila amforo, kiu kuŝis en lia valizeto. Atente li premis la valizeton al sia brusto kaj la amforo kvazaŭ nesenteble iĝis la celo de lia tuta oficvojaĝo. Ŝajnis al li, ke li venis en Atenon nur por aĉeti tiun ĉi amforon por Ina.

La aviadilo alteriĝis ĝuste je la deknaŭa horo kaj duono. Estis malvarma, nebula novembra vespero. Karov rapidis hejmen. Dum la tuta vojo, de la flughaveno ĝis la loĝejo, li silente sidis en la taksio kaj daŭre atente premis la valizeton al la brusto.

En la ĉambro li unue malfermis la valizeton, atente elpakis la amforon kaj metis ĝin en la libroŝrankon.

Ĉinokte vi dormos ĉi tie kaj morgaŭ vi estos en la ĉambro de Ina — diris Karov ŝerce, kvazaŭ la amforo estus viva estaĵo.

Malgraŭ ke jam pasis la oka kaj duono, li sentis bezonon tuj telefoni al Ina kaj diri al ŝi, ke bonorde li revenis kaj morgaŭ, ĉirkaŭ la kvina posttagmeze, li atendos ŝin en la kafejo.

Karov elprenis sian notlibreton kun telefonnumeroj kaj komencis serĉi la hejman telefonnumeron de Ina. Jes, 523-924. Li elektis la ciferojn kaj retenante eĉ la spriron, ekatendis. La konata signalo montris, ke la telefonlinio ne estas okupata. En ĉiu sekundo li povis aŭdi la voĉon de Ina aŭ de ŝia patrino, sed ŝajne tiu ĉi sekundo iĝis ege longa, ĉar neniu levis la aŭdilon.

— Eble ili ne estas hejme — konkludis Karov kaj remetis la aŭdilon.

Post duona horo li denove elektis la ciferojn de ŝia telefonnumero. Sekvis longa atendo...

Ĉivespere Karov provis kelkfoje telefoni, sed vane. Pasis noktomezo, kiam li enlitiĝis, decidante, ke morgaŭ matene, el la oficejo, li telefonos al ŝi.

Tamen matene ĉio ripetiĝis tiel same kiel vespere. Plurfoje Karov provis telefoni, sed sensukcese. Obstine li daŭrigis la provojn ankaŭ posttagmeze kaj vespere.

La sekvan tagon ia maltrankvilo komencis enŝteliĝi en lin kaj post ĉiu nova provo telefoni al Ina, tiu ĉi maltrankvilo pli kaj pli kreskis. Li jam ne sciis kion pensi; ĉu la tuta familio de Ina forveturis ien, aŭ eble ilia telefonaparato ne funkcias. Kelkfoje li kontrolis la telefonnumeron. Ne. Li ne eraris. Ina mem enskribis ĝin en lian notlibreton. Klare videblis ŝia skribmaniero, kaj ne povis esti eraro. Certe dum unu semajno oni ne ŝanĝis la telefonnumeron. Tamen, strabante la telefonciferojn en la notlibreto, Karov subite rememoris, ke antaŭe li neniam telefonis al Ina. Ja, preskaŭ ĉiutage ili renkontiĝis en la kafejo kaj li tute ne bezonis telefoni al ŝi. Eble nur foje li ne povis iri al la kafejo kaj tiam li provis averti ŝin telefone, sed ankaŭ tiam neniu respondis. Li delonge jam forgesis tiun ĉi bagatelan fakton, sed nun ĝi vekis lian suspekton. Karov tuj prenis la telefonlibron kaj komencis febre trafoliumi ĝin.

— Sed Dio...! — preskaŭ svenis Karov.

En la telefonlibro tute ne estis familia nomo Lontanov kaj tia telefonnumero. Ina nomiĝis Ina Lontanova, do la familia nomo de ŝia patro devis esti Lontanov, sed neniu Lontanov loĝis en strato „Monto" 39 kaj neniu havis similan telefonnumeron. Tio estis nekomprenebla. Verŝajne kiam aperis la telefonlibro, la familio de Ina ankoraŭ ne havis telefonon. Tamen... Karov iom meditis. Tiu ĉi supozo ŝajnis al li tute reala, sed kial neniu levas la aŭdilon. Ĉu eblas, ke tiu ĉi telefonnumero tute ne ekzistas?

Kelkajn minutojn Karov nervoze promenis en la ĉambro.

Dum la sekva tago li apenaŭ havis pacienc con resti en la oficejo ĝis la fino de la labortempo, kaj je la kvara kaj duono li jam rapidis al la kafejo „Primavero".

La amforo kuŝis en la valizeto kaj Karov ege atentis, ke hazarde la valizeto ne falu, kaj ne rompiĝu la fragila argila amforeto.

Feliĉe la tablo en la angulo estis libera. Karov eksidis ĉe ĝi kaj nevole alrigardis la gobelinon.

Iĝis kvina horo kaj duono, sed Ina ne venis. Pasis la sesa, sepa, oka, sed ŝi tute ne aperis. La silenta atendado komencis simili al memtorturo, tamen profunde en si Karov provis trankviligi sin:

„Kompreneble ŝi ne venos, ĉar ŝi ne scias, ke mi atendas ŝin ĉi tie."

Vespere li denove provis telefoni, sed la rezulto estis la sama. Neniu respondis. Restis la sola ebleco viziti ŝin hejme.

Pasis nova koŝmara tago. Duonhoron antaŭ la fino de la labortempo Karov ekiris al la domo de Ina. La strato „Monto" troviĝis en la centro de la urbo kaj li povis trankvile atingi ĝin ankaŭ piedirante, sed li prenis aŭtobuson, ĉar ŝajnis al li, ke ĉiu minuto gravas.

Ĉe la aŭtobushaltejo li aĉetis krizantemojn por la patrino de Ina. En la valizeto kuŝis la amforo, kiu jam du tagojn estis tie, pakita zorge en paperoj.

Rapide Karov supreniris ĝis la kvina etaĝo kaj spirante peze ekstaris antaŭ la konata pordo. Li pretis eksonorigi, kiam subite rimarkis, ke sur la ŝildeto de la pordo legeblas alia nomo. Anstataŭ Lontanov estis skribita Kardelov. Kelkajn sekundojn, kiel fulmfrapita Karov fiksrigardis la nomŝildeton.

— Eble mi eraris pri la etaĝo — li flustris al si mem kaj tuj kontrolis ĉu la etaĝo sur kiu li staras estas la kvina. Sendube. Sur la muro, granda Romia cifero, fandita el latuno, montris, ke la etaĝo estas la sama. Li tre bone memoris tiun ĉi latunan ciferon, kiun li vidis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam li vizitis Ina-n.

— Sed ĉu ili jam ne loĝas ĉi tie, aŭ povas esti, ke ŝia familia nomo ne estas Lontanova, sed Kardelova.

Tamen li sonorigis. Post du minutoj la pordo malfermiĝis kaj antaŭ li ekstaris tute nekonata virino, eble sesdekjara, vestita en longa hejma robo.

— Mi petas pardonon. Mi serĉas Ina-n, Ina-n Lontanova-n — afable diris Karov.

La nekonata virino alrigardis lin demande.

— Ina Lontanova, studentino — ripetis Karov, ĉar ŝajne la virino ne tre bone aŭdis.

— Ĉi tie ne loĝas studentino.

— Tamen, ĉu nun ne loĝas? — ne komprenis Karov.

— Neniam loĝis, iu, kiel vi diris?

— Ina Lontanova — helpis ŝin Karov.

— Jes. Neniam loĝis ia Lontanova — aplombe deklaris la virino.

— Sed, sed... de kiam Vi loĝas ĉi tie?

— Jam de kvardek jaroj.

— De kvardek jaroj? Tamen antaŭ du semajnoj mi estis ĝuste en tiu ĉi loĝejo... Ŝi mem invitis min... — komencis balbuti Karov.

La grizaj pupiloj de la virino larĝiĝis, ĉu pro surprizo, ĉu pro timo, kaj ŝi rapide turnis sin por eniri la loĝejon, sed Karov ne havis tempon mediti. Li puŝis la virinon internen kaj fermis post si la pordon. Tion la maljunulino ne atendis. Ŝi gapis konsternite, sed tuj post la unua rigidiĝo, ŝi rekonsciiĝis kaj ekkriegis:

— Ŝtelisto, murdisto...

Karov ŝtopis mane ŝian buŝon. Subkonscie li sentis, ke nun li nepre devas kontroli ĉion. Nun aŭ neniam li devis konvinkiĝi, ĉu iam li estis en tiu ĉi loĝejo aŭ ne, kaj ĉu fakte li travivis ion, kion ne eblas logike klarigi. En tiu ĉi momento li ne pensis ĉu en la domo estas iu alia kaj kio okazus, se oni kaptus lin. Li rapidis al la pordo, malantaŭ kiu eble estis la solvo de la mistero. Karov preskaŭ certis, ke tie, en la ĉambro, silente sidas Ina kaj trankvile atendas lian perfortan eniron.

Li haste malfermis la pordon. La ĉambro similis al tiu, en kiu li sidis antaŭ du semajnoj. La fenestroj rigardis al la strato „Monto", pli ĝuste al la hotelo „Metropolo", sed la mebloj en ĝi ne estis la samaj.

Meze staris ronda baroka tablo kun kelkaj barokaj seĝoj, ĉe la fenestro — olda kanapo, tegita per nigra ledo, kontraŭ ĝi — malmoda komodo. Polvo kovris la meblojn kaj iom mucidis la aero, kvazaŭ delonge neniu ĉi tie malfermis la fenestrojn.

Dum Karov observis la ĉambron, la povra virino kuntiriĝis time kaj singulte.

— Ne mortigu min. Mi petas... Mi estas malriĉa vidvino... Nek monon, nek oron mi havas...

Ŝia plorĝemo, pli simila al hunda lamento, vekis lin. Karov komprenis kion li faris. Li ĵetis la krizantemojn kaj ekkuris al la pordo. Kurante freneze li descendis al la teretaĝo. Feliĉe neniu videblis en la ŝtuparejo. Li ankoraŭ ne estis sur la teretaĝo, kiam de la kvina etaĝo aŭdiĝis raŭkaj krioj:

— Helpu, helpu! Ŝtelisto, murdisto...

Karov rapidigis sian kuradon. Li ne havis alian eblon krom kuri kaj tute malaperi el tiu ĉi loĝkvartalo. La unua najbara strato estis iom malluma kaj Karov pli trankvile ekmarŝis sur ĝi. Lia kapo muĝis, la vizaĝo febre brulis kaj li tute ne komprenis kio ĝuste okazis. Nevole liaj lipoj flustris: „Ina Lontanova, strato „Monto" 39, kvina etaĝo." Sed ĉio estis kiel inkuba sonĝo.

Dum la tuta nokto li ne ekdormis. Plurfoje li leviĝis, lumigis la ĉambron, prenis la notlibreton kaj longe strabis la telefonnumeron de Ina, skribitan per ŝia propra mano. Denove li kuŝiĝis, sed tuj li elsaltis kiel iu pikita. Ŝajnis al li, ke iu sonorigas ĉe la pordo, aŭ hastaj paŝoj proksimiĝas al la loĝejo.

— Ĉu oni serĉos min? — febre li meditis.

Antaŭ la tagiĝo li ekdormis. En la sonĝo aŭdiĝis bruo de aŭto. Estis nigra taksio kaj de ĝia malantaŭa fenestro eta blanka mano svingiĝis al li adiaŭe. Konata voĉo konfide diris al li: „En la reto, kune kun sennombraj fiŝoj estas kaptita mem la suno. Tiu ĉi granda oranĝa suno." Kiam la nebula mateno heligis la fenestrojn de la ĉambro, li vekiĝis, ellitiĝis kaj provis sobre pripensi ĉion, kio okazis. Kelkaj demandoj turmente krozis en lia konscio:

„Kiu ŝi estis? De kie ŝi aperis kaj kie malaperis?"

Posttagmeze, ĉirkaŭ la kvina, laca, senespera li iris en la kafejon „Primavero", eksidis ĉe la tablo en la angulo kaj strabis la gobelinon. Li jam sciis, ŝi venos nek hodiaŭ, nek morgaŭ, nek postmorgaŭ. Li deziris rememori ŝiajn okulojn, ŝian vizaĝon, ŝian voĉon, sed nenion konkretan li memoris. Ŝajnis al li, ke li rigardas malnovan fotografaĵon, sur kiu apenaŭ videblas kaj rekoneblas la trajtoj de kelkaj nekonataj personoj.

Ekstere vesperiĝis. La homoj sur la trotuaro similis al palaj ombroj, kiuj rapide fandiĝis en la laktan nebulon. Peze li ekstaris, sed subite li rememoris, ke li ne pagis la kafon kaj mansvingis al la kelnerino. Ŝi afable proksimiĝis al li.

— Unu kafon mi pagas — diris Karov, tamen antaŭ ol doni al ŝi la monon, li iom hezite demandis: — Pardonu min, sed se Vi bone memoras, antaŭ du semajnoj, preskaŭ ĉiutage mi estis ĉi tie kun iu junulino.

La kelnerino atente alrigardis lin.

— Brunhara, studentino... Ĉu hazarde ŝi ne estis hodiaŭ ĉi tie?

La bluaj pupiloj de la kelnerino larĝiĝis, ĉu pro surprizo, ĉu pro timo.

Li metis la bankbileton sur la tablon kaj rapide ekiris al la pordo.

Hejme li malfermis la valizeton, elprenis el ĝi la grekan amforon, kelkajn minutojn senmove li rigardis ĝin kaj tenere tenis en la manplatoj. Poste per subita movo li frapis la amforon planken. Je cent pecetoj ĝi rompiĝis.

— Tamen bone estis, ke iam ie ŝi ekzistis — li elflustris kontente.

Poemoj de Bertram Potts

La jakohava hundo

Hodiaŭ sur la strato mi vidis grandan hundon
kun naz-alta eleganta sinjorino;
ĝi ŝtele ĵetis flanken rigardon sur la grundon,
sed katenis ĝin severa disciplino.

Ĝi marŝis kun orgojlo, best-moŝto eminenta,
kaj sendube havis rason grand-valoran,
ĉar tio estis klara, facile evidenta –
ĝi grand-pompe portis jakon ruĝ-koloran.

Mi algapis ĝin mir-plene, tio estis ja unika,
sed vest-arte ĝi kondutis ne modele;
respekte mi sufloris per voĉo bon-amika –
ĉiun vorton ĝi aŭskultis gap-orele.

„Pardonu min, mi petas, alt-moŝta Ekscelenco,
sed vi breĉas etiketon kaj bon-tonon.
Jen estas informeto – ruĝiga konfidenco –
grand-sinjoroj ĉiam portas pantalonon! "

Ne plu ĝi paŝis brile, la voston ĝi subtiris,
kaj ĝi rampis kun senglora kapo-pendo;
jam krevis la fiero, sin kaŝi ĝi deziris,
veaspekta kiel truo-hava bendo.

La hundo kun tri kruroj

Rikardo, hundo kun tri kruroj,
kaj kvara nur el ligno
ne sentas mankon de plezuroj,
kaj ĉiutagaj aventuroj,
kaj portas sin kun digno.

Klop kaj klop kaj klop kaj klop
promenas tiel Riko,
klop kaj klop kaj klop kaj klop
kun takto de muziko.

Li kuras kaj li saltas boje,
scivole ĉion flaras,
kaj ostojn enterigas ĝoje
kaj bonokaze ĉiufoje
ĉe fostoj niagaras.
Klop kaj klop kaj klop kaj klop
li tiamaniere iras,
klop kaj klop kaj klop kaj klop
Rikardon ni admiras.

Li venas al amikoj puŝe
kaj sian stumpon levas
kaj ruze ekploretas buŝe,
aspektas triste kaj kortuŝe –
frandaĵojn li ricevas.
Klop kaj klop kaj klop kaj klop
Li bone min komprenas.
Klop kaj klop kaj klop kaj klop.
Al mi li apartenas.

FOKUSO

Nova popularscienca periodajo

En Esperantujo malmultas gazetoj, periodaĵoj, kiuj okupiĝas unuavice ne pri la Esperanto-movado, sed utiligas la lingvon kaj movadon por informi pri aliaj temoj. Apenaŭ ekzistas Esperantlingvaj periodaĵoj, kiuj celus kaj iagrade eĉ kapablus konkurenci — se ne kvante, tiam albenaŭ kvalite — kun la naciligvaj amaskomunikiloj. Ŝajnas, tamen ke guste tion celas la redaktoroj de „Fokuso", nova kvaronjara popular-scienca periodaĵo de Hungara Esperanto-Asocio.

Jugante jam laŭ la unua numero, ĝi ne estas popular-scienca laŭ la kutima senco. Ĝi ne konatigas pli-malpli hazarde elektitajn sciencajn fenomenojn (kvankam ankaŭ tio povus esti interesa), sed klopoblas informi pri aktualaj aferoj, rekte koncernantaj la vivon de homoj.

„Fokuso" estas nekutima periodaĵo (kompare kun similtipaj naciligvaj revuoj) ankaŭ pro tio, ke ĝi strebas aperigi laŭeble multajn artikolojn pri lingve izolitaj kaj malgrandaj (laŭ areo kaj nombro de logantoj) landoj.

„Fokuso" celas la vastan publikon ankaŭ per sia stilo: la lingvaĵo ne estas tre faka, kaj la tekstoj estas facile kompreneblaj ankaŭ por legantoj kun ĝenerala klereco, sen specialaj fakkonoj. La „digesteblon" helpas la multnombraj karikaturoj kaj aliaj ilustraĵoj.

„Fokuso" estas „posteulo" de la periodaĵo „Internacia Komputado". Tion montras ankaŭ la temaro de la unua numero (76-paga) de „Fokuso". Pluraj artikoloj traktas la historion kaj nunan situacion de mikroelektroniko kaj mikrokomputiloj, dum kelkaj aliaj priskribas komputilajn programojn (interalie la enkomputiligitan version de la „Fundamento de Esperanto" de Zamenhof). Oni povas legi ankaŭ pri sciencaj parkoj („katalizantoj de la evoluo") en diversaj landoj. En tiu ĉi numero la pliampleksigon de la temaro — kompare kun „Internacia Komputado" — reprezentas la rubrikoj pri ekonomiko kaj psikiatrio. Artikolo de hungara ekonomikistino analizas la „kasitan ekonomion", t.e. la avantagkojn kaj malavantagojn de la ne-registritaj enspezoj de la logantaro. En aliaj artikoloj estas priskribita nova tendenco en psikiatrio („dinamika psikiatrio") kun konkretaj praktikaj ekzemploj, kaj specifa — kaj sukcesa — eksperimento koncerne la edukadon de mense malsanaj infanoj.

La dua numero de „Fokuso" laŭ la planoj enhavos artikolon pri robotoj, pri novaj atingoj en la diagnozo kaj kuracado de kancero, pri la internacia ŝuldokrizo el specifa vidpunkto, pri la agad-metodoj de la plej elstaraj entreprenoj de la mondo, pri novaj eksperimentoj en pedagogio, pri mistera fizika fenomeno (por kies solvo la aŭtoro petas la helpon de la legantoj) kaj aliaj temoj.

La prezo de „Fokuso" estas la sama kiel estis tiu de „Internacia Komputado". (Ekzemple, ĉe UEA kvar numeroj — t.e. unu jarkolekto — estas mendeblaj por 24 ned. guldenoj.) Ankaŭ la reto de perantoj restis la sama.

La novan periodaĵon prizorgas la Komputista kaj Ekonomikista Grupoj de HEA. La respondeca redaktoro estas d-ro *Broczkó* Péter kaj la redaktoro sLukács *András*.

La adreso de la redakcio estas:

Fokuso, Esperanto-centro, Budapest, Pf. 193., H-1368.

recenzoj

Poeto de sia popolo

Attila József: Urboranda nokto. Poemaro. Tradukis: Kálmán Kalocsay, Imre Szabó k.a. Red.: Vilmos Benczik. Eldonis: HEA. Budapest, 1986. Prezo: 13,80 gld. (Por Hungario: 55,- forintoj.)



Tiu ĉi libro inaŭguras la planatan serion „Hungara literaturo". Kvankam la esperantistaro ankaŭ nun ne estas profano pri la hungara literaturo, ja certe ĝi konas tiun multe pli ol ajna meznivela alilingvano. Tion ni dankas unue al la granda Kalocsay kaj lia jam klasika „La tragedio de l' homo" de Madách. Tion helpas la vigla eldona agado de HEA. Ni jam legis hungarajn prozaĵojn kaj dramojn, la poezion de Petőfi, Ady. Kaj Attila József vicas en tiu logika ĉeno.

Li naskiĝis en povra proleta familio, frue restis sen patro, sed malgraŭ tio li sukcesis ricevi bonan kleron. Tion verŝajne ŝuldiĝas, krom la ŝanco, ankaŭ al la natura strebo al scio, propra al ĉiu talento. Li frue trovis sian destinon. Jam dekunujara li verkas sian unuan poemon, kaj en lia deksepa jaro aperas lia unua poemaro.

Li venas en la maturan vivon post la unua mondmilito, post la ĝojaj tagoj de la unua Hungara Konsilia Respubliko, kiujn li spertis knabe. Li vivis kaj verkis en la atmosfero de la plifortiĝanta reakcio, faŝismiĝanta reĝimo. Liaj ĉefaj temoj iĝas la ribelo kaj senmaskigo de la kapitalo, kaŭzanta la maljuston kaj malsaton:

...dum dungas vin kapitalisto
profitas nur la kapital'.

Li iĝas vere proleta poeto, esprimanta la bezonojn de la malriĉuloj. Li eĉ aniĝas en la Hungara Komunista Partio kaj aktive laboras en ĝi. Li klopodas unuigi ĉiujn progresivajn fortojn kontraŭ la faŝismo, sed ne trovas komprenon en la sektema partio:

Mia ekzisto, vivo vanis —
konstatas eĉ mi mem facile.
.....
Ridinde, ke mi kulpis malpli
ol oni al mi malbonfaris.

Ne komprenata, eksigita el la partio, nerve malsana li suicidas subtrajne. Sed ne plene pritaksita en sia tempo, li trovis la popolan agnoskon kaj gloron postmorte en la socialisma Hungario. Liaj ideoj efektiviĝas nun en la strategio de la Hungara Patriota Popolfronto.

Mi ne estus objektiva, ne menciinte lian lirikon de amo kaj naturo. Ĉi tie oni povas renkonti jen apenaŭ kompreneblajn figurojn de la superrealisma influo, jen kristale klarajn miniaturojn kiel „Meditante", tre similajn karaktere al la japanaj tankao kaj utao.

La libron konsistigas tradukoj de ok konataj hungaraj tradukistoj.

Estas tradukoj de la jam forpasintaj Kaloocsay kaj Tárkony. El la pli junaj mi aparte mencius Imre Szabó. Kaj ne tial, ke li pli produktis, sed pro la klara, natura lingvaĵo. Tio konstateblas el la paralelaj tradukoj. Ja kelkaj poemoj estas prezentitaj per du, tri, eĉ kvin versioj. Jen kiel interese li freŝigis la forme originalan poemon „Je mia naskiĝdato", konatan al la esperantistoj en la traduko de Rados:

Tridek dua datreveno —
jen, surprizo ĉi-poemo,
feno-
meno... (Szabó)

Al tridekdua datreveno
surprizo estu ĉi poemo —
dekor'
de kor'... (Rados)

Uzante mozaikajn kaj enradikajn rimojn, li sukcesas anstataŭigi la banaletajn: trude-krude, tamen-amen per la surprizaj: tre distretis, ĉiam-mi jam k.a.

Sed mi ne dirus, ke se iu poemo estas pli bona, la ceteraj tradukoj estas superfluaj. En ĉiu traduko la evidente ne tre facile tradukebla poeto montras al ni siajn diversajn facetojn, kaj opo de tradukoj kreas komunan impreson.

Mi pensas, ke la ŝatantoj de la poezio trovos la libron interesa. Oni havas eblecon konatiĝi kun la poeto plej influinta al la moderna hungara poezio. Ankaŭ la tradukologoj havos materialoj por esploro.

Nikolaj Lozgaĉev

Bezonata libro

„Baza Legolibro por Komencantoj", redaktita de Vilmos Benczik, eldonita de Hungara Esperanto-Asoio en 1986, formato 140 x 196 mm, 117 paĝoj, prezo 13,80 gld. (Por Hungario: 55,- forintoj.)

Interesan ideon realigis HEA per la eldono de ĉi tiu baza legolibro: enmanigi al komencantoj legaĵojn tuj post ekkompreno de la gramatika fundamento de Esperanto. Do, jam tre frue oni volas instigi lernantojn al legado de Esperan-

recenzoj

taj tekstoj. Tion ebligas aldonita 44-paĝa kvinlingva vortaro (angla, germana, hungara, pola kaj rusa). Ĉi tiu listo enhavas ĉiujn vortojn, kiuj aperas en la legindaj tekstoj. 37 mallongaj legaĵoj (mallongaj tial, por ne trostreĉi la novbakitajn esperantistojn) estas disigitaj en du partoj. La unuaj 12 baziĝas sur 401 radikoj laŭ la unuaj tri oftecgrupoj de la Baza Radikaro Oficiala, kiujn ellaboris la Akademio de Esperanto. Kaj la ceteraj 25 legaĵoj utiligas la 706 radikojn de la unuaj kvin oftecgrupoj de la Baza Radikaro. Per tio nesperta komencanto-leganto relative facile povas tralegi la libron. Tio helpas akiri certan legorutinon sen konsulti instruiston. En la libroantaŭparolo estas formulite: „Kutimigi la lernantojn dekomence al la hejma memstara legado en Esperanto estas ŝlosila tasko de lingvokursoj, ja la novaj esperantistoj tiamaniere kun pli da ŝanco fariĝos regulaj legantoj de Esperantaj libroj..."

La eldonistoj donas multajn subtenojn por faciligi la komprenon de la legaĵoj. Interalie oni dispartigis per streketoj kunmetaĵojn por rekoni ilin: mal-voli, tra-veturi, ktp. Tio okazis ne konsekvence ĝis la lasta radikero, ĝis la lasta sufikso. Eble tio rekomendindas, almenaŭ por la unua libroparto, por kiu cetere ĉiuj radikoj aperas majuskle en la vortaro.

Jen oni enplektu, ke kvinlingvan vortaron prilaboris esperantistoj parolantaj la respektivajn lingvojn. En la germanan parton, kaj nur pri tiu mi povas juĝi, eniĝis eraro: „jaro" en la germana signifas „Jahr".

Ĉiuj tekstoj de la libro uzas simplajn stilrimedojn kaj frazkonstrukciojn, tamen ili estas altnivelaj kaj lernigaj por komencantoj. Oni renkontas originalaĵojn kiel ankaŭ tradukaĵojn ĝis nun ne aperigitajn. La leganto ekscias, preskaŭ preterpase, ankaŭ kelkaĵojn pri la Lingvo Internacia. Tio bonas. Okaze de ebla dua eldono oni kontrolu kelkloke enŝteliĝintajn preserarojn, ekzemple „Henri Barbusse" (sur paĝo 60) estas kriple kompostita. Oni ne trotaksu tiajn erarojn, ili ne abundas en ĉi tiu libro. Tamen necesas obĵeti, ke ja temas pri baza legolibro por komencantoj! Tial eraroj povas engravuriĝi en la cerbojn kaj influi la futuran lingvouzon de la librokonsumantoj — eraroj en tia libro malpermesiĝas!

Tutcerte la unua eldonkvanto de ĉi tiu libro baldaŭ elĉerpiĝos, ĉar ekzistas bezono por tiaspeca eldonaĵo. Uzantoj de kvin lingvogrupoj nuntempe povas eluzi ĝin. Se la hungaraj eldonistoj kuraĝus aldoni pliajn fremdlingvajn vortolistojn (ekzemple en la franca, hispana, portugala, itala, ĉeĥa kaj bulgara lingvoj) — eble eĉ kiel apartaĵo presita kaj bindita — tiam ili trafus sur mondvastan merkaton. Kaj tion ĉi oni nepre deziru al tiu valora baza legolibro!

Joachim Schulze

Inundo de sintenoj

István Nemere: La alta akvo. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1985; 129 paĝoj; formato: 140x200 mm; prezo: 15 guldenoj.

István Nemere — konata nekonato por mi. Mi zelotas pri li. Pri liaj romanoj. Kaj ĉi tiuj estas konataj al mi, la aŭtoron mi ne persone konas. Mi nur scias, ke Nemere kun konstanta reguleco, kvazaŭ oni povus ĝustigi la horloĝon laŭ li, naskadas esperantlingvajn romanojn. „Blinda birdo", „Sur kompo granita" ktp. devenis el lia plumo. Kaj ili jam trovis grandan rekonon inter la esperantista legantaro.

Nun surmerkatiĝis lia nova romano „La alta akvo". Temas pri la interrilatoj de tri ĉefrolantoj: la inĝeniero Valter Nográdi, ties edzino Izabela kaj Peter Orban, iama profesoro. La altiĝanta akvo, kaŭzita per akvobaraĵo, minacas la ermitejon de la profesoro kaj la rilatojn inter la trio. Nemere skribis romanon kun aktuala temo, pri naturprotektado kaj strebado de la socio plialtigi la industrian produktadon per kurento, kiun liveru la fortoj de la akvo. La akvon retenas granda digo. Sekve ĝi inundas la terenon kaj la pensojn, elvokas agadojn de la inĝeniero, Izabela kaj Peter, kiujn la leganto antaŭe ne povas prikalkuli.

Tiom sufiĉu pri la enhavo de la romano. Mi aldonu kelkaĵojn ĝeneralajn pri Nemere, pri liaj stilrimedoj. Li fascine ludigas la vortojn, surpaperigas koncizajn frazojn, esprimas pensojn per malmultaj vortoj. Nemere elĉerpas preskaŭ ĉiujn eblecojn, donitajn fare de la Lingvo Internacia. Preskaŭ ĝis la limo de la farebleco li ĵonglas per



vortoj. Li (kiel jam antaŭ li ankaŭ aliaj aŭtoroj) eluzas la vortkonstruadon, kreas kunmetitaĵojn malofte legitajn. Sed, li ankaŭ kunmetas prepoziciojn en nekutima maniero: „desur", „desub"... ĉu vere nekutimaĵoj? „Depost" jam delonge kaŝe penetris en Esperanton. Nemere nun nur logike sekvas al tiu tendenco. Ĉu bona tendenco aŭ ne? Mi nek havas la kuraĝon nek la kompetentecon prijuĝi tion. Certe estus tasko por la Akademio de Esperanto doni klarajn respondojn (kaj ne nur pri tiu relativa malgravaĵo!).

Nemere majstras nian lingvon. Li emas perfekte mallongigi la frazojn. Ekzemplo montru per kio li atingas tion: „Ne tuŝante permane la bariereton li iras supren". La hungara aŭtoro eluzas la eblecon de la adverbigado — aparta donaco por esperantlingva verkisto! Nemere akceptas danke tiun ĉi donacon. Kaj la legantaro certe lian novan romanon, kiu ne estu lia lasta!

Joachim Schulze

GAJA PAĜO



Vole-Nevole

Policisto demandas la ebrietan aŭtiston:
— Diru jam, kiel vi povis sidi en tiu farto apud la stirilon?
— Nu, facila tio ne estis. Sed miaj amikoj helpis...

Manĝi Ŝanĝi

— Vi devas jam nepre maldikiĝi! — avertas kuracisto bieremulon. — Anstataŭ glaso da biero bonvolu enbuŝigi unu pomon!
— Sed tio ja estas neebla! Kiel mi povus manĝi ĉiutage tridek pomojn?

Frunte de prunto

— Kara sinjoro pardonu! Donu prunte al mi du forintojn por trambileto, ĉar mia monujo perdiĝis.
— Ege mi bedaŭras, sed mi havas nur centforintan monbileton...
— Faras nenion! Almenaŭ mi veturos per aksio.

Prompta prunto?

— Je la diablo, Karlo! Jam la kvinan fojon mi alvokas vin redoni al mi tiujn mil frankojn...

— Ĉu vi miras? Almenaŭ dekfoje mi devis peti, ke vi pruntedonu ilin al mi!

Tiuj edzoj!

— Mia edzo havis plurajn malbonajn kutinojn antaŭ nia geedziĝo...
— Terure, amikino! Nu ja, tiaj ili estas... Sed li jam korektiĝis, ĉu ne?
— Ĉu li? Kun liaj malbonegaj kutimaroj?

Ej, edzoj!

— Bedaŭru min, amiko! Mia edzino serie vizitadas la drinkejojn.
— Kurioze! Kion ŝi serĉadas tie?
— Min.

Tribunale

— Kiam nomis vin la procesato unuafoje hipopotamo?
— Antaŭ du jaroj, sinjoro juĝisto!
— Kaj nur nun vi procesas pro tiu insulto?
— Jes, ĉar mi vizitis dum la kongreso la Pekinan zoon.

Eble li

staras antaŭ la kuracisto, kiu kolere admonas:
— Tuj vi devas ĉesigi la konstantan drinkadon! Tuj!
— Sed kial tiel impete alkrias min, doktoro?

— Ĉar ĉe la lasta sangopreno via sango tuj forvaporiĝis antaŭ ol ni ekzamenis ĝin!

Eble ŝi

plendis al alia kuracisto pri kapdoloroj, kaj aŭskultis la konsilon:
— Vi bezonas, sinjorino, distradon por trankviliĝi.
— Aĥ vane — aĉhumore ŝi mangestas — mi jam provis ĉiamaniere trovi distron... Sed mia edzo gardas min kiel ĉashundo!

Eble inter ili

— Prefere mi estus edziniĝinta al la diablo... — aŭdeblas ŝia verŝajne justa kriado.
— Domaĝe, eĉ junaĝe ne ekzistis por vi tiu ŝanco! — rejetas la edzo. — Inter proksimaj parencoj la geedziĝo estas malpermesata!

Suspekto

— Estas strange, kara kolegino! Hodiaŭ jam la duan fojon mi renkontas en la tramo la saman kondukiston, altan brunan viron, kun ĉarma rido kaj dikaj lipharoj.
— Povas okazi, aŭ ne?
— Sed mi certas, ke li obstine sekvas min!

Maljuniĝo

Plendas s-ro Solasido: Post lia sesdeka naskiĝtago eĉ lia korvonigra peruko ekgriziĝis...

Sed iutempe

lia freŝa edzineto konfesis post la nupta nokto:

— Kiel pasie vi kondutis, Solasiĉjo! Sed ne havu iluzion: vi ne estis la unua... Tamen havu ĝojon: vi ne estis la plej malbona!

Fraz' pri raz'

— Najbaro! Ĉu la polico kaptis jam vian ŝteliston?
— Ankoraŭ ne, sed oni jam scias, kie li estis razita.
— Do, kie?
— Sur la vizaĝo.

Ervin Fenyvesi

PRI KÁLMÁN KALOCSAY

Ni citas kelkajn titolojn el lia verkaro. (H.1., H.15., H.75. kaj V.1., V.16., V.19. — ensendendaj linioj.) Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALE: 1. Beletra revuo, redaktita de Kalocsay, ĉirkaŭ kiu grupiĝis la Budapeŝta Skolo, 14. Adoranto de fetiĉo, amuleto, 15. Titolo de komuna jubilea libro de Baghy kaj Kalocsay (sen „O" finaĵo), 17. Senmakula (R), 18. Fari ion malveran kaj prezenti kiel veran (R), 20. Valormetalo, 21. Kemia simbolo de Masurio, 22. Finaĵo de flago (!), 23. Koncerna ŝatatan legomon, 25. Disrompi terbulojn (R), 27. Arto de kinematografio, 28. Samspecaj de rokaro, 30. Nek vin, nek min, 32. Surfaco, imitanta elipson, 34. ...- ato: riĉa apoganto de artoj, 36. Esperanta Rondo Amika (kreaĵo de Baghy), 37. Grasa kaj alkala (aĵo por lavpurigi, 38. Reen: kapvest', 39. Longigis ion, 41. Pli ol sufiĉe, 42. Gramatika fenomeno, kiam vorto havas plurajn signifojn, 43. Tabelvorto, 44. Rilatan al la „Hungara Maro", 45. Kilogramo, 46. Koncernantan la publikan sanon, 47. La plej grava E-vortaro, 48. Tiel oni volonte donacas, 50. Monkest', 51. E-ligo de instruistoj, 52. Metal', 53. Para organo de mamuloj, 54. Plezure manĝi ion delikatan (R), 55. Rilata al oni, 57. Konsonantoj de oratoro, 58. Fermebla elfuejo (R), 59. Kolektiva, 61. Honorus kiel diaĵon, 63. Aĉa prefikso, 64. Persona pronomo, 66. Tersurfac', 68. Reen: ama liptuŝo, 69. Reen grekdevena scienca prefikso (=vivo), 70. Manĝeblajn marajn moluskojn, 73. Instrument' por sondi aŭ dilati korpan kanalon, 75. Poemaro, tradukita el la monda poezio, aperis post la morto de Kalocsay.

VERTIKALE: 1. Titolo de esearo de Kalocsay, 2. Elementa koncepto, 3. Mister... aĉetas mil okulojn, 4. Preposicio, 5. Vegetaĵo kun manĝebla radiko, 6. Membraro, 7. Teksaĵo, 8. Duono de robo (!), 9. Kolekto, 10. Sur maro, 11. Impresi flarsenton, 12. Interjekcio, 13. Loĝkonstruaĵo (R), 16. Komuna verko de Kalocsay kaj Waringhien, 19. Poemaro de Kalocsay, 23. Sube ĉeftrabego de ŝipoj, 24. Flankaj, kromaj, 26. Defenda parolo, 27. Parto de korpo, 29. Ne ellasas, 31. Sin movi, 33. Komercaĵo, 34. Senkonsidera, nezorgema, 35. Belorusia rivero (sen „O" finaĵo), 38. Substanc' kun multobla molekulo-maso, 40. Nek vin, nek ilin, 42. Partet' el ĉiutaga mangaĵo, 44. Limo (R), 45. Demanda tabelvorto, 46. Aro da



objektoj aŭ aferoj, 47. Antaŭe pripensita kaj ordigita program', 49. Alpa varma vento (R), 51. Sin movas, 54. Vegetaĵprodukto, 56. Disigita de aliaj (R), 58. Eligas akran voĉon, 60. Agrabla odor', 62. Reen: stango, ĉirkaŭ kiu turniĝas rado, 63. Memfida, tre konscia pri siaj meritoj (R), 65. Sufiks', 67. Loko, 69. Interno de motoro (!), 71. TU, 72. Identaj konsonantoj, 74. Preposicio.

I.Z.

Solvo de la krucenigmo en la numero 1986/3:

.....Kiel grandega strasa tulo
Nin kovras la ĉiela arko
Kaj lante kun ni la insulo
Eknaĝas kiel nupto-barko.

(Kálmán Kalocsay)

Premion gajnis per lotumado: Lidia Neri Lami, Livorno, I; D-ro Martin Schüler, Kleinmachnow, GDR; Biruté Trimakienė, Kapsukas, Litovio, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Márton Fejes

HURA!

de Julio Baghy

Post pli ol kvindek jaroj HEA reeldonis tiun ampleksan romanon de Julio Baghy, kiun li karakterizis „ne romano — nur grimaco".

1. Kiom da dolaroj testamentis Vilhelmo Gauer al sia naskiĝurbo?
2. Kio estas la nomo de tiu urbo?
3. Kiun nomon havas la filo de la testamentinto?

Limdato: du monatoj post la alvero de la revuo.

* * *

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1986/3:

1. La „blinda mondmigrulo" estis Vasilij Eroŝenko.
2. La antaŭparolon de „Dek prelegoj" verkis Ada Csiszár.
3. „Centjara estus jam la koro" estis la titolo de la prelegon finanta poemo de Kalocsay.

Premion gajnis per lotumado: BÁRKÁNYI Istvánne;, Kiskunhalas, H; Bernd MANN, LEIPZIG, GDR.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:

1987/2: „Obsedita de l' Suno", romano de I. Gáll;

1987/3: „Mariagnes", romano de Lorjak;

Korespondi deziras

Membroj de Volgograda E-Klubo RADO serĉas geamikojn. Resp. gar. „Moldoj. centr.", str. Ĉujkova 65, SU- 400. 115. * Berlina Junulara E-Grupo en aprilo aranĝos letervesperon pro jubileo de Eo kaj Berlino. Salutojn kaj E-aĵojn sekvos dankleteroj! Ingo FISCHER Ho-Chi-Minh-Str. 19/B, 0204, Berlin, DDR-1156. * F-ino Jolanta BABIAZ (23) int. fotoarto, pentrarto. ZOBKOWICE SL, ul. Kosciuszki 5/2, PL-57-200. * Slawomir STYMALA (24) int. turismo, fotografio, kol. mapo, tur. prosp., gvidlibroj, prefere kun hungaraj ges-anoj. POCZESNA, ul. Strazacka 24, PL-42-262. * Pedagogino Elena AVDIK (31) ktm pĉt, precipe infanoj, E-lernado de plej junaj. GRODNO Dom Svjazi, poŝt-restante. SU-230. 025. * Jan LIBRA (37) ktm int. turismo, muziko, filatelo, kol. pm, bk. BLANSKO, Dobrovského 1, CS-678 01. * F-ino Wanda NIEMIECKA (21) lab. en antaŭlernejo, int. turismo, literaturo, folkloro, lingvoj, kol. pm, bk, libroj. GREBÓW-917, PL-39-410. * F-ino Barbara LADOS (22) pĉt. NOWY SACZ Lwowska 85/9. PL-33-300. * F-ino Iwona SALAMON (17) mezlernejano, kol. pm, bk, glum, aktorfotoj, int. libroj, muziko, Eo, Japanio. RYBNIK, ul. Wspólna 5. PL-44-200. * Inĝ. Ralf JANKE (29) ktm, pĉt, prec. tekniko. POTSDAM-Babelsberg, Grünstr. 11. DDR-1590. *

Lernantoj (12-15) kun samaĝuloj ktm, pri turismo, arto, paco, bk, k.a. E-rondeto, s-ino Ir. Ĉerkasova, 1. Mezlernejo, placo Frunze, SARATOV, SU-410.017. * S-ro WANG Quanming (24) oficisto ktm, pri ekonomiko, foto, belarto, literaturo, pm, bk. (Rén Dá Cháng Wéi Hui) Xinhua-Lu str. NEIJIANG, 641.000, Ĉinio. * Ludmilla JELAGINA (22) fizikistino, ktm, pri komputilprogramado, psikologio, scienca komunismo. Resp. gar. ROSTOV-DON, Parusnyj 36, SU-344.034. * Pri historiaj konstruaĵoj, kasteloj, popolkutimoj ktm. Csaba KOVÁCS (24) konstruinĝ.-studento, BUDAPEST, Kruspér u.2. H-1111. * Galja ARKADIUSZ (25) int. turismo, folkloro, kol. pm, bk, tur. mapoj. LUBAWKA, str. Kosciuszki 4/3. PL-58-420. * Vladimir GOLUBEV (30) pri fotado, lingvoj, turismo, ŝako, libroj, gram. diskoj k.a. Resp. gar. ROSTOV-DON, Dneprovskij 111, kv. 212. SU-344.046. * Anna PARTEKA (15) kun geknaboj pĉt krom sporto. GDANSK, ul. Filomatów 14. PL-80-119. * Przemyslaw PIEKARSKI (21) kun hungaraj gejunuloj pri sporto, turismo, pentrarto. ŽYRARDÓW ul. Pienka 25m22. PL-96-300. * S-ro Bernt SCHWARDT (24) kun samaĝaj hungaraj ges-anoj pri beletro, historio, lingvoj k.a. ANGERED, Hammarkulle-torget 30. S-424 37. * Junaj flegistinoj (kaj lernantinoj) ktm, pĉt post E-kurso, resp. gar. CHORZÓW, Esperanto-filio, str. Wolnośći 37, PL-41-500. * Anoj (16-40) de E-Klubo TEMPO, en Leningrada regiono, ktm, pĉt kun novaj geamikoj. TIĤVIN, A/k 2. SU-187.-500. * S-ino Anna LORENTZ, verkisitino, (komencantino en E), pĉt, prec. pri literaturo, arto. VÄRNAMO, Malmgatan 5, S-331 00.

Leterkesto

Al niaj legantoj: Multajn kore skribitajn bondezirojn devas nia redakcio danki kaj reciproke sendi al niaj afablaj legantoj plenanimajn instigojn por daŭre kaj brave agadi favore al nia jubileanta Internacia Lingvo! Uzu kaj ĝuu Esperanton pere de la multaj ebloj, kiujn ĝi prezentas al ni ĉiuj ankaŭ en la nova jaro!

Maria Jakobsons, Riga, Latvio SU: Ankaŭ flanke de István Nemere ni varme dankas la ricevitan paĝon de la latva revuo („Literaturo kaj Atro"), kiu publikigis noveletojn de nia populara verkisto. Plaĉis, ke enkonduke Nora Brice informis la publikon ankaŭ pri la originala literaturo kaj la jubileo de Eo. Laŭdinde trafe elektis la tradukisto, Guntars Brális, atentokaptajn ĉarmajn pecojn de Nemere, verŝajne multajn stimulontajn por eklegi ankaŭ liajn romanojn.

Jan Kafka, Klášterec n. O., CS: Ankaŭ nin kontentigis, kiel vi solvis sukcese la kolektadon kaj bindadon de la E-revuoj, ankaŭ de H.V. Ĉar ni konscias, ke sistema kolektado neniam estas tro facila afero, ni scias respekti la penojn por ilia kompletigo — kaj por disponi pri stokadon ebliganta loĝejo! Multajn plezurojn dum legado!

Jefim Zajdman, Jalta, SU: La kantoj de József Dinnyés, kaj lia brava agado vekis pli da intereso tra la mondo, ol nia redakcio supozis. Vi demandis pri liaj eksterordinaraj E-lecionoj: temas pri malkutimaj lernejaj horoj, dum kiuj Dinnyés konigas al E-on lernantaj infanoj la plej belajn E-poemojn. Ties eduka efiko montriĝis alte emociplena. Vian leteron ni transdonis al li.

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 141-078, 334-194. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca aldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704.

MESz nyomda 86-0130

Hungara esperantistoj!
Fariĝu dum vivaj membroj de HEA!



FERTAS

nur al vi:

ATRIUM HYATT BUDAPEST *****
Bp., Roosevelt tér 2. (361) 383-000

BUDA PENTA HOTEL ****
Bp., I. Krisztina krt. 41/43. (361) 568-373

NOVOTEL BUDAPEST ****
Bp., XII. Alkotás u. 63/67. 869-588

BUDAPEST CONVENTION CENTRE
Bp., XII. Jagelló út 1/3. 666-756

HOTEL OLYMPIA ****
Bp., XII. Eötvös út 40. 568-011

HOTEL AERO ***
Bp., IX. Ferde u. 1/3. 274-690

HOTEL EMKE ***
Bp., VII. Akácfa u. 1/3. 229-814

HOTEL METROPOL **
Bp., VII. Rákóczi út 58. 421-175

HOTEL NEMZETI **
Bp., VIII. József krt.4. 339-160

HOTEL PALACE ***
Bp., VIII. Rákóczi út 43. 136-000

HOTEL PARK **
Bp., VIII. Baross tér 10. 131-420

HOTEL VOLGA ***
Bp., XIII. Dózsa György út 65. 408-314

HOTEL WIEN **
Bp., XI. Budaörsi út 88/90. 665-400

PANNÓNIA TOURIST SERVICE
Bp., VIII. Rákóczi út 9.
141-886, 141-820

PANNONIA
HOTELS & RESTAURANTS

ĈE LA CIKCIDENTA PORDO DE HUNGARIO KORE SALUTAS KAJ BONVENIGAS VIN LA DOMMASTRO DE LA DEPARTEMENTO GYŐR-SOPRON:

ciklámen tourist

BELEGAJ MALNOVAJ ARKITEKTURAJ
KREAĴOJ. UNIKAJ
NATURBELAĴOJ. FAMA
GASTRONOMIO.







VIZITU NIN, ESTU NIA GASTO!



El la sekvaj numeroj de „HUNGARA VIVO" Vi povos ĉerpi pli detalajn informojn pri la vidindaĵoj de nia departemento. Petu nian Esperantlingvan prospekton ce la sekva adreso:

CIKLAMEN TOURIST
H-9023 GYŐR, JÓKAI U. 12.
☎ 36/96-16-050
Tx: 24-616

1087